

# EL POPOLA ĈINIO




中國新道

7

1999

ISSN 0032 - 4361

**La 7-a de majo, tago  
neforgesebla por la ĉinoj  
Invito de Hongkong  
Donu al mi paron da flugiloj**



Al fundo de koral-rifo

de BARBARA LANGER (Pollando)

*Legante la indekson de ĉi tiu numero vi trovos frapajn titolojn "La 7-a de majo, tago neforgesebla por la ĉinoj", "Oni memoros iliajn nomojn" kaj "Esperantistoj alvokas pacon". La unuaj du raportas pri la bombado de NATO estrata de Usono al la ĉina ambasadorejo en Jugoslavio. Sendube vi, bonkoraj kaj pac-amaj samideanoj, ne ŝatas legi sangajn raportaĵojn, ĉar vi rifuzas tiajn sangajn barbaraĵojn. Fakte ankaŭ ni havas la saman koron kiel vi. Ni ne povas reteni nian indignon vizaĝe al la atenco al la suvereneco de nia patrolando kaj sangado kaj morto de niaj samlandanoj. Pere de aliaj kanaloj vi certe informiĝis, ke la ĉina popolo protestis per diversaj manieroj por defendi la dignon de la nacio, kaj ankaŭ la popoloj de multaj landoj, inkluzive de Usono kaj aliaj membrandoj de NATO, manifestaciis por oponi kontraŭ milito kaj subteni la ĉinan popolon.*

*Niaj mallongaj raportaĵoj celas helpi vin pli bone informiĝi pri la afero, ĉar bruadis multaj mensogoj. Oficistoj de NATO aŭ atribuis "misbombadon" al malĝusta informo, aŭ mensogis, ke ekarte funkciis la pafsistemo. Sed la tri misiloj trafis la saman celon de diversaj direktoj! Kiel do ili povas pravigi sian argumenton? Tio estas nenio alia ol preteksto por sin ekskuzi. Ĉu oni ne vidis, ke ili bombadis loĝejojn, hospitalojn, veturilojn de ordinaraj homoj pretekstante "misbombadon"? Kriante "defendi homajn rajtojn", ili senigis la senkulpajn popolojn je minimumaj rajtoj de ekzisto.*

*Lastatempe ni ricevis multajn leterojn kaj retmesaĝojn de niaj legantoj argumentantaj pri la milito en Jugoslavio, inkluzive artilokon de UEA-prezidanto s-ro Kep Enderby aperantan en ĉi tiu numero. "Ĉesu la milito" kaj "redonu la pacon al la tero" estas ilia kaj ankaŭ nia komuna deziro.*

La Red.

# El Popola Ĉinio

7 [490] 1999



Kun kolomboj

Foto de Cheng Yuyang

Antaŭe loĝantoj de Pekino vidis kolombojn ofte en aŝiŝoj kaj gravaj ceremonioj kaj nun en parkoj kaj sur urboplaĉoj. Oni ŝatas kolombojn kaj bredas ilin, ĉar ili estas simbolo de paco kaj sinceraj amikoj de la homoj. En lokoj suferantaj de milito ili donas al la homoj konsolon kaj esperon.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/ElPopolaCxinio>>

# ENHAŬO

- |    |  |    |  |
|----|--|----|--|
| 2  | <b>INTER NI</b>  | 32 | Elekti vilaĝestron   |
| 4  | <b>EKONOMIE:</b><br>Daŭre produkti "Hongqi";<br>Lando de bicikloj; Kurantaj aferoj | 35 | Li semas esperon   |
| 6  | La 7-a de majo, tago neforgesebla por la ĉinoj                                     | 36 | <b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:</b><br>Donu al mi paron da flugiloj |
| 8  | Oni memoros iliajn nomojn  | 38 | Maĝango en Ĉinio   |
| 9  | Esperantistoj alvokas pacon  | 39 | <b>POR KOMENCANTOJ:</b><br>Stelulino — nigra anaso                 |
| 10 | En tagoj kun japanaj esperantistoj (V)   | 40 | <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b>  |
| 13 | <b>ESP-NOVAĴOJ</b>   | 42 | Piedira vizitgrupo   |
| 14 | <b>JUNULARO:</b><br>Invito de Hongkong   | 44 | <b>ORDINARAJ ĈINOJ:</b><br>Amo inter la patro kaj la filino        |
| 16 | La Nova Realismo   | 46 | <b>ĈINA KULTURO:</b><br>Historieto de humura dialogo               |
| 19 | Ceramikisto kaj liaj verkoj  | 48 | Maizkulturado en suda Ĉinio  |
| 20 | Judoj en Ŝanhajo dum la Dua Mondmilito   | 50 | <b>POR VIA SANO:</b><br>Kiun rolon ludas teo en sanprotekto?       |
| 21 | <b>VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:</b><br>Ĉjang-oj ŝatas kapveston                         | 51 | <b>ĈINAJ POŝTMARKOJ:</b><br>Stepo Xilin Gol                        |
| 24 | <b>SERĈO DE SHANGRILA:</b><br>Hejmloko de orharaj simioj                           | 2  | <b>FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:</b><br>Al fundo de koral-rifo         |
| 28 | <b>EN ĈINAJ URBETOJ:</b><br>Jiajiang, paper-urbeto                                 |    | <b>SUR LA DORSKOVRILO:</b><br>Huangshan-monto en nubaro            |



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                        |                         |
|------------------------|-------------------------|
| 1. Hebei-prov. (p. 35) | 4. Fujian-prov. (p. 48) |
| 2. Jiayang (p. 28)     | 5. Diqing (p. 24)       |
| 3. Ŝanhajo (p. 20)     |                         |

# Daŭre produkti “Hongqi”



de CHANG CHUN

**L**A Unua Ĉina Aŭtokompanio (grupo) estas granda ŝtata entrepreno en la nordo de Ĉinio. En 1958 ĝi produktis kamionojn kun la marko “Jiefang” kaj ankaŭ la unuan personaŭton de Ĉinio kun la marko “Dongfeng” kaj altklasan aŭtomobilon kun la marko “Hongqi”. Dum longa tempo aŭtoj kun la marko “Hongqi” estis disponeblaj sole por la ŝtataj gvidantoj, do en la okuloj de la ĉinoj ĝi havis specialan signifon.

Aŭtoprodukto markas sintezan nivelon de la industria disvolviĝo de la lando. En la aŭtoprodukta rondo oni diras, ke “Granda fabriko faras malgrandan aŭton, dum malgranda fabriko — grandan aŭton”. Tio ja estas afero ĉagrenanta la aŭtokompanion. Kvankam la kompanio estas la plej granda el la

samspeculoj, kaj ĝi produktas la fierindan aŭton “Hongqi”, tamen en ĉirkaŭ 30 jaroj la ĉefa el ĝiaj

produktaĵoj estis nur kamiono kun la marko “Jiefang”. La aŭto “Hongqi” estis bone taksata de fremd-



Novtipa aŭto Hongqi

landaj aŭtofabrikistoj, sed tia aŭto estis farita per manlaborado, ne per moderna ĉenlaborado, tial de 1959 ĝis 1981, la kompanio fabrikis nur 1 542 tiumarkajn aŭtomobilojn.

Post la 80-aj jaroj, vizaĝe al importado de alilandaj aŭtoj, la personaro de la kompanio ekhavis fortan deziron: reformi "Hongqi", kuratingi la avangardan nivelon de aŭtofabrikado de la mondo kaj daŭre produkti "Hongqi". Sekve la kompanio komencis kunlaboron kun la germana aŭtokompanio Volkswagenwerk AG, daŭre enkondukis teknologion anstataŭ praktiki akcion. Post kelkaj jaroj la kompanio jam posedis la internacie progresan teknologion de fabrikado de aŭtopecoj kaj muntado. En septembro de 1998 la kompanio elfaris mezklasan aŭton "Hongqi 98-Nova Stelo" kun internacia nivelo de la 90-aj jaroj. Per tio la aŭtokompanio daŭre tenis la markon "Hongqi".

Nun la aŭtokompanio realigis sian deziron "granda fabriko faras malgrandan aŭton", kaj la jara produktokvanto de aŭtoj kreskis de 30 000 kamionoj "Jiefang" al 450 000 aŭtoj de diversaj tipoj inkluzive de la grandaj, malgrandaj, leĝeraj, mikraj kaj pasaĝeraj. La jara produktokvanto de aŭtomobiloj "Hongqi" baldaŭ kreskos de 30 000 al 110 000. ■

# Lando de bicikloj

de JI PING

**B**ICIKLO enkondukiĝis de Eŭropo en Ĉinion en la komenco de la kuranta jarcento, kiel donaco por Puyi (1906-1967), la lasta imperiestro de Ĉinio.

Nun en Ĉinio estas pli ol 400 fabrikoj de bicikloj, kies jara produktokvanto estas 70 milionoj da bicikloj, kaj en la lastaj 6 sinsekvaj jaroj Ĉinio eksportis ĉiujare pli ol 10 milionojn da bicikloj, plej multe en la mondo.

Biciklado ne konsumas fuelon, ne faras poluon kaj bruon, kaj krome biciklo estas malmultekosta kaj facile riparebla, tial ĝi tre konformas al la konsumnivelo kaj la vivmedio de ĉinoj. Dum longa tempo biciklo restas grava trafikilo por ĉinoj, kvankam pli kaj pli multiĝas aŭtomobiloj.

Nun oni postulas pli multe da bicikloj.

Antaŭ dekkelke da jaroj en Ĉinio estis tri famaj produktomar-

koj de bicikloj, nome "Fenikso", "Eterne" kaj "Kolombo". Tiam oni estis tre kontentaj je posedo de tia biciklo, ĉar la aĉeto postulis biciklokuponon. Sed nun tiuj tri markoj jam elmodiĝis, kaj oni preferas la novtipan kun bela koloro, ekzemple leĝeran, montaran, multrapiduman kaj konkur-san. Por plenumi la bezonon de la merkato, la fabrikoj senĉese produktas novtipajn, dum la malnovaj materialoj estis anstataŭigitaj per alumina alojo, karbona fibro, titania alojo kaj vitroplasto. Apliko de novtipaj materialoj multe malgrandigis la pezon de bicikloj.

Nun ĉinoj ekŝatis altrapidan biciklon. Pli ol 100 biciklofabrikoj en Pekino, Ŝanhajo, Xiamen, Kunming, Chengdu kaj Wuhan sin turnis al fabrikado de elektra biciklo. Oni kredas, ke elektra biciklo senbrua kaj senpolua estas tre taŭga por mediprotektado, kaj ĝi furoros dum longa tempo en Ĉinio. ■

## KURANTAJ AFEROJ

● Por la grandioza jubileo de la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, oni faras grandskalan rekonstruadon al Tian'anmen-placo: anstataŭigi la cementan pavimon per rozeta granito sur la placo kaj trotuaroj kun la totala areo de 160 000 kvadrataj metroj; plibonigi la akustikon kaj iluminadon de la placo kaj ĉirkaŭaj konstruaĵoj, aldoni gazonojn kaj reformi la subteran tubaron.

● La ĉinaj virinoj ĉiam ludas gravan rolon en la ekonomia konstruado de Ĉinio. 5-6 dekonoj de la totala produktovaloro de agrikul-

turo estis plenumitaj de la virinoj. En la nordo, nordoriento kaj mezo de Ĉinio la virinoj sin okupas per kulturado, bredado kaj manlaborado proksime de sia hejmo, ekzemple bredi porkojn, kokojn kaj vulpojn, kulturi vinberon kaj ginkon, fari brodadon kaj trikadon. Multe da junaj kaj mezaĝaj virinoj ne plu sin okupas sole je la agrikultura produkto. Sole en la provincoj Shandong, Fujian kaj Shaanxi 2.8 milionoj da virinoj sin okupas je vendado de siaj produktaĵoj.

● Dum 1989-1998 la nombro de privataj entreprenoj en Ĉinio kres-

kis de 90 581 al 960 726 kaj la registrita kapitalo kreskis de 8.4 miliardoj da juanoj al 514 miliardoj da juanoj.

● La plej granda kaj plej alte situanta sunenergia elektrejo kun kapacito de 100 kilovattoj estis lanĉita en la antaŭe senelektra gubernio Anduo sur la stepo en la nordo de Tibeto.

● Freŝdate en Moskvo ĉinoj lanĉis la unuan ĉinan memservon en la komerca kvartalo. Tie la Pekina Komerca Grupo Tiankelong instalas ekipaĵojn en valoro de 20 milionoj da juanoj kaj liveris ĉinajn varojn de 6 600 specoj.


# La 7-a de majo, tago

de ZHANG XIAOWEN

**L**A 7-a de majo estas tago neniam forgesebla por la ĉinoj. Noktomeze tri misiloj de NATO bombis la ĉinan ambasadorejon en Jugoslavio, viktimitigis tri raportistojn, vundis pli ol 20 personojn kaj detruis ĝian domon. Tio ege surprizis kaj indignigis la ĉinan popolon.

La bonkoraj homoj neniel povas kredi tiun kruelan fakton. S-ro Lü Yansong, ĉina ĵurnalisto laboranta en Beogrado, telefone rakontis la teruran okazaĵon: "Tiun vesperon NATO refoje detruis la elektoliveran sistemon de Beogrado, ke la urbo dronis en mallumo. Ni interparolis dekkelkope sidante en la korto de la ambasadorejo. Je 23:30 nia ambasadoro Pan Zhanlin diris, ke ni iru ripozi, ĉar estis jam malfrue. Malpli ol unu minuton post kiam mi kaj mia edzino iris supren laŭ la ŝtuparo, ni aŭdis surdigan bruegon. Ni stuporiĝis kaj vidis la tegmenton bruege fali antaŭ niaj okuloj kaj rompaĵojn de armita betono fali nur dekkelkajn centimetrojn antaŭ ni. Tuj poste sekvis la dua eksplodo. Estis detruita la ŝtuparo, malaperis la balustrado, kaj ni devis malsupreniri paŝon post paŝo, kaptante elmontritajn ferajn stangojn en betono varmegajn pro la brulo..."

Kiam Lü Yansong kaj aliaj eliris en la korton, ili vidis incendion. Unu el la tri misiloj falis sur la komunikejon inter la ambasadora rezidejo kaj ambasadoreja domo, alia penetriĝis de sur la tegmento de la kvina etaĝo ĝis la fundo de la subtera etaĝo, kaj la tria eniĝis de flanko. La dormoĉambro de ĉina raportistino Shao Yunhuan kaj ŝia edzo Cao Rongfei, la unua sekre-



La domo de la ĉina ambasadorejo bombita de NATO-misiloj

# neforgeŝebla por la ĉinoj

tario de la ambasadorejo, estis trafita de la misilo. Oni trovis ŝian kadavron en la dua etaĝo. Cao du-ŝonis kun okuloj grave vunditaj. La aliaj viktimoj Xu Xinghu kaj lia novedzino Zhu Ying estis trovitaj 3-4 horojn post la bombado. Xu havis doloran aspekton kun manoj forte baraktantaj. Zhu estis eksplode ĵetita en la subteran etaĝon...

Pro la eksplodo brulis la benzino rezervita en la subtera etaĝo kaj la botel-gaso en la kuirejo. En tiu situacio personoj en la dua etaĝo devis malsuprengrimpigi helpe de tordita littuko. Iu el ili falis pro rompiĝo de la littuko kaj vundis al si la pelvon. Tri personoj en la kvina etaĝo longe atendis, ĝis oni savis ilin per eskalo. La armean ataŝeon Ren Baokai oni trovis nur naŭ horojn post la bombado. Li perdis la konscion, kun vizaĝo makulita de koto kaj sango.

Kiel konate, internaciaj leĝoj klare difinas, ke ambasadorejo de iu ŝtato estas ties netuŝebla teritorio en alia lando, kaj bombi ĝin signifas bombi ĝian teritorion. Nun la hejmo de ĉinoj laborantaj en Jugoslavio estas atakita kaj ĉinoj estas mortigitaj en sia hejmo, ĉu tio ne vekus la publikan indignon?

Ni demandu: Kio estas la internacia justico en la okuloj de NATO gvidata de Usono, kiu atencas la suverenecon de alia lando kaj malrespektas la ĉarton de UN kaj la konvencion pri internaciaj rilatoj? Ili kritikis ĉie malrespekton al la homaj rajtoj, sed kion ili faras per bombado?

Kiel ajn NATO senkulpigas sin, ĝi ne povas nei la mortigadon en la 7-a de majo kaj ankaŭ tion la ĉinoj neniam forgesos! ■



Ĉinaj studentoj protestas antaŭ la usona ambasadorejo en Pekino



Xu Xinghu kaj Zhu Ying en bombita fabriko de Jugoslavio



Xu Xinghu intervjuanta loĝanton de Beogrado

# Oni memoros iliajn nomojn



Shao Yunhuan



Xu Xinghu



Zhu Ying

de PANG BIAN

**E**N malnovtipa korto en norda Ĉinio ĉ. 80-jara maljunulino ĉiutage preĝis kun kunmetitaj manoj en la direkto al Jugoslavio. En 1998 ŝia nepino Zhu Ying kaj ties novedzo Xu Xinghu estis sendotaj al Beogrado kiel raportistoj. Ĉe la adiaŭo ŝi diris al la maljunulino: "Anjo, vivu sane. Post nia reveno ni naskos por vi pranepojn." La maljunulino senĉese balancis la kapon: "Mi atendas tiun tagon."

Sed ŝia atendo rompiĝis. Venis al ŝi malĝojiga informo pri ilia viktimiĝo. Ili mortis en dormo pro bombardo de misilo. Samtempe mortis ankaŭ Shao Yunhuan, 48-jara raportistino de Xinhua-novajagentejo.

Unu tagon antaŭ la Patrino Tago, la patrino de Zhu Ying informiĝis pri tio. Ŝi diris ripetade: "Kial tio povas okazi?" En ordinara kamparana domo en suda Ĉinio la 69-jara patrino de Xu Xinghu korŝire ploradis vokante lian nomon. Ploroj aŭdiĝis ankaŭ el la domo de emerita laboristo en la urbo Jiamusi, nordorienta Ĉinio. La maljunaj gepatroj de Shao Yunhuan svenis kaj rekonsciiĝinte kriis kun larmoj: "Usono, NATO, redonu al ni la filinon!"

"Hodiaŭ estas la Patrino Tago, sed hieraŭ mi perdis la patrino..." plorsingultis Cao Lei, 19-jara filo de Shao Yunhuan. En la pasinta aŭtuno li ekstudis en Beogrado. Lia patro

estas diplomato de la ĉina ambasadorejo en Jugoslavio. Ankaŭ lia patrino venis tien kiel raportistino antaŭ du monatoj. Pro la milito li kunestis kun la gepatroj nur dekelkajn tagojn en Beogrado kaj foriris al Rumanio kune kun aliaj studentoj. Informiĝinte frumatene de la 8-a de majo pri la bombado

lingvan Instituton por studi la serban lingvon. Post kiam ŝi venis al Jugoslavio kiel ĵurnalistino, ŝi skribis multajn ĝustatempajn kaj objektivajn raportaĵojn pri la milita situacio malgraŭ danĝero de la milito. En sia lasta tago ŝi faris intervjuon en loĝkvartalo je 230 km for de Beogrado.

Ankaŭ Xu Xinghu studis la serban lingvon. Post diplomiĝo el altlernejo en 1990, tiu modesta kamparana filo eklaboris kiel redaktoro en la internacia fako de la redakcio de *Guangming Ribao* (Ĵurnalo Lumo). Li estis diligenta kaj simpatia. Post kiam NATO komencis bombi Jugoslavion, li ofte estis unu el la fremdlandaj raportistoj, kiuj plej frue atingis bombitajn lokojn. Lia amata kaj bela edzino Zhu Ying 27-jara estis serena kaj vigla, kaj la ĉina ambasado rigardis ŝin kiel sian fratineton. En sia milita taglibro "Spertado de Milito" Xu Xinghu skribis, ke li kaj lia edzino persistos ĝis la fino de la milito. Kiam streĉiĝis la situacio, li admonis ŝin, ke ŝi foriru, sed ŝi diris: "Mi restu



Korŝirita patro de Zhu Ying

Foto de Huang Wen

de NATO al la ĉina ambasadorejo en Jugoslavio kaj viktimiĝo de la patrino, li ne povis deteni sin de larmoj... Tiutage ankaŭ lia patro estis grave vundita je la okuloj.

En 1971 Shao Yunhuan estis akceptita en la Pekinan Fremd-

ĉiam kun vi." En la malfacila situacio li ricevis ŝian ĝustatempan helpon. Li skribis: "Krom lavi vestojn kaj prepari manĝon, ŝi ankaŭ retendas miajn raportaĵojn; kelkfoje ŝi veturigas min per aŭtomobilo, ke mi povu iom ripozi; ŝi fotografas



kaj prizorgas pri rivelado kaj komputera balaado. Misilo ne trafas nin, tial ni ne timas... Nur kiam eksonas alarmo kontraŭ aeratako, ŝi maltrankviliĝas pro mi, intervjuanta ekstere..."

La 10-an de majo la tri viktimoj kuŝis inter freŝaj floroj en la preĝejo de la nova tombejo de Beogrado. Tio estis tago de adiaŭo al ili. Ĉe la enirejo de la preĝejo du serbaj maljunulinoj bruligis kandelojn. La patro de Zhu Ying en korŝira doloro karesis la vizaĝon de sia filino kaj diris plorante: "Mia filino, mi akompanos vin hejmen!"

Ascedante la aviadilon reflugantan al Ĉinio, li forte brakumis la cindrounojn de siaj filino kaj bofilo kaj vokadis iliajn nomojn laŭ la postulo de sia edzino, por ke iliaj spiritoj ne perdu la vojon dum la hejmeniro.

Ili revenis hejmen. Oni duonhisis la kvin-stelan ruĝan flagon por fenebro. La ĉina prezidanto venis al la memorsalono por diri al ili funebran saluton. Sennombraj loĝantoj venis al la loko, preterpasota de la funebra veturilo, por bon-



Vundito en beograda hospitalo

venigi ilin. Oni ĉiam memoros iliajn nomojn Shao Yunhuan, Xu Xinghu kaj Zhu Ying. ■

## Esperantistoj alvokas pacon

**E**N la pasintaj tagoj, el raportoj de ĉinaj ĵurnaloj kaj televidaj programoj ni informiĝis pri la terura situacio en Jugoslavio. Estas ricevataj ankaŭ multaj ĉi-rilataj mesaĝoj de esperantistoj el diversaj partoj de la mondo. Ĉiuj ĉinaj esperantistoj indignas kontraŭ la barbara bombado de NATO, kiu mortigis senkulpajn homojn kaj ruinigis civilajn konstruaĵojn.

La bombado al la ĉina ambasadorejo en Jugoslavio ege ŝokis kaj kolerigis la ĉinajn esperantistojn, kiuj okazigis diversajn kunvenojn por esprimi sian deziron pri paco. Usona samideano Kent Jones sendis al ni retmesaĝon, kiu tekstas:

"Mi hontas ke mia Usono decidis denove esti internacia gangstero. Ĝi jam agis tiel en Sudano, Afganio, Libio, Irako, Grenado kaj Panamo, kaj estas la nura lando kiu iam eksplodigis atombombon sur urboj. Mi esprimis tion al prezidento Clinton antaŭ lia bombado de via ambasadejo. Mi tre bedaŭras la aferon."

S-ro Kep Enderby, prezidanto de UEA, verkis jenan artikolon:

La tuta internacia esperantistaro estas konsternegita kaj hororigita

de kio okazas en la Balkanaj landoj.

Krom la kruela mortigado de tiom da senkulpaj homoj, kaj la detruo de hejmoj kaj posedaĵoj, aparta kaj pli specifa perdo estas perdo de la vero, alia trafita viktimo. Ree memevidentiĝas ke tiuj kiuj kulpas en tiaj aferoj, ĉiam provas influ, flamigeble, aliajn mensoge, tro ofte sukcese.

Krom la hororo, kaj nia konsterniĝo, kiujn do ni devus kulpiĝi? Kion dirus Zamenhof se li ankoraŭ vivus?

Sendube, ne la ordinarajn popolojn. Ili estas viktimoj, ofte iloj ankaŭ, sed ĉiam viktimoj. Pli bona demando estus, kiu avantaĝas sekve la kreon de tia situacio? Eĉ respondo al tia demando ofte ne sufiĉas doni la tutan veron. Profesiaj generaloj posedante ultre modernajn armilojn volonte kontribuas, lude, provuzante tiajn armilojn. Ankaŭ ili kulpas eĉ pli grave kiam ili havas la proksimajn orelojn de la politikistoj.

Ĉu ambiciaj politikistoj rolas ekspluatante religiajn kaj malnovajn historiajn plendojn? Ĉu homoj tiaj povas esti tiom fiaj? Jes, ja, kiam ili akceptas siajn proprajn mem kreitajn antaŭjuĝojn, tiam ili

ja kulpas pleje, kaj klare meritas ricevi niajn plejfortajn kondamnojn, ĉar ili havas la potencon. Estas ili kiuj respondecas.

Estas ili kiuj preterpasis la Sekurecan Konsilion de la Unuiĝintaj Nacioj, la nun paralizita ĉefa internacia instanco. Ne decas en Esperanta ĵurnalo mencii registarajn nomojn. Ĉu rememorigo de la Ligo de Nacioj. Tamen, vere senleĝa skandalo.

Kio atendos nin?

Nepre, politika malstabileco en tiu parto de la mondo; longtempe rikolto de amara kaj longdaŭra memoro pri la maljustecoj kiuj okazis; malameco kaj venĝo atendos multajn, eĉ nin kiuj ne estas envolvataj; terorismo, tia kia minace daŭros tra multaj generacioj. Niaj nepoj kaj nepinoj pagos por tio, kion niaj regantoj okazigas al ni en la Balkana Duoninsulo.

Ĉu tia analizo sufiĉas. Certe ne!

Ni devas klopodi kompreni pli bone, juste, kio okazis, kaj plej bone ripari la teruraĵojn jam okazintajn.

Ni ĉiuj pledu kaj aktiviĝu celante al tiu kiu havas la potencon, laŭte kaj ĉiam pli laŭte dirante al ili: ĉesigu la mortigadon, donu ŝancon al paco! Vivu la paco! Uzu la Organizon de Unuiĝintaj Nacioj! ■

## DE FUKUŜIMA AL ŜIZUOKA

Antaŭtagmeze de la 21-a de oktobro mi forlasis Sendai kaj veturis al Fukuŝima, alia urbo en la nordorienta parto de Japanio. S-ino Yazaki Yoko, prezidanto de la Fukuŝima E-klubo, kondukis min de la stacidomo rekte al la Centra Publika Domo de Fukuŝima, por ke mi faru prelegon pri Ĉinio. Posttagmeze, mi ekskursis kune kun lokaj esperantistoj en antaŭurbo de Fukuŝima.

Por veturi de Fukuŝima al Ŝizuoka, mi devis ŝanĝi trajnon en Tokio. Dank' al la helpo de s-ino Yazaki Yoko kaj s-ro Mochizuki Masahiro, mi ne perdiĝis en trafika labirinto de Tokio. La trajno ruliĝis al Ŝizuoka. En loko nemalproksima sub la hela aŭtuna ĉielo ĉarmis Fuĵi-monto, kies pinton jam kovris blanka neĝo.

Mi konatiĝis kun s-ro Mochizuki dum mia vojaĝo en Japanio.

Kvankam novaj amikoj, ni sentis nin intimaj en E-aktivadoj. Lia E-mentoro estis s-ro Tokuda Rokuro, fama japana E-movadano. Lin ĉiam sekvante, s-ro Mochizuki aktive disvastigis Esperanton kaj akcelis la amikan interŝanĝon inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj. Por ke mia vizito estu fruktodona, li bone aranĝis la aktivadojn kun temoj pri interŝanĝo de ideograma kulturo. Li nomis min "la gasto el lando de ideograma".

Atinginte Ŝizuoka, mi sekvis s-rojn Mochizuki Masahiro kaj Ikegaya Haruo al la Ŝizuoka Kultura kaj Eduka Centro por renkontiĝi kun iliaj kolegoj en la eduka rondo. Vespere mi partoprenis la lernadon en ilia E-klubo. Estas neforgesebla por mi la renkontiĝo kun kvinklasaj lernantoj de elementaj lernejoj en Hatori kaj Andou antaŭtagmeze de la sekvanta tago. La lernantoj gaje akceptis min per salutvortoj kaj desegnoj sur nigra tabulo kaj min bombardis per demandoj en ne tiom flua Esperanto.

Ili multe interesiĝis pri japanaj kaj ĉinaj ideogramoj en

sama formo, sed kun malsamaj signifoj. Ĉe adiaŭo la geknaboj manpremis min, kaj mi deziris al ili grandan sukceson en lernado.

Antaŭvespere de mia forlaso de Ŝizuoka, s-ro Mochizuki donis vesperan bankedon en ĉina restoracio por min adiaŭi. Ĝin ĉeestis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj, kiuj klopodis por amika interŝanĝo inter Japanio kaj Ĉinio.

Mi ege ĝojis pri la renkontiĝo kun japanaj amikoj ĉe la 20-jariĝo de "Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio".

## DUM SEP TAGOJ EN AICHI

Mi komencis mian vojaĝon en Japanio ekde Nagoja, ĉefurbo de Aichi. Fine, mi revenis tien por pasigi la lastan semajnon de mia vojaĝo gaja kaj signifplena.

S-ro Suzuki Joŝihiko, kiu lernis Esperanton antaŭ 20 jaroj en universitato, laboras en Nagoja kaj loĝas en Okazaki, kiun mi atingis semajnfine. S-ro Suzuki akompanis min viziti la urbon kaj poste veturigis min al sia hejmloko. Tio estas bela montvilaĝo. Ni promenis



en arbaro kaj sur kampoj de lia familio, ĝuante odoron de japana kamparo. Tiutage ankaŭ liaj gefratoj revenis el aliaj lokoj por rekuniĝi kun la gepatroj. En la sekvanta tago, s-ro Suzuki kondukis min al Koranhi najbare de Toyota por ĝui ace-rajn foliojn. Posttagmeze mi kaj lia tuta familio vizitis ekspozicion de artaĵoj faritaj de element- kaj mezlernejanoj, kiu okazas ĉiujare en la Arta Muzeo de Tutmondaj Geknaboj en Okazaki. Pli ol 30 mil artaĵoj plenigis la ĝardenon. Ni tuj trovis la verkon de la filo de s-ro Suzuki "Knabinoj ludantaj violonĉelon", sed ni ne sukcesis trovi tiun de lia filino.

Mi venis de Okazaki al Toyohashi, kie sidas parto de Aichi-universitato. Akompanate de s-ro Nakayama Kinĵi, mi vizitis la ekspozicion pri la historio de la universitato, ĝiajn bibliotekon kaj renomajn redakcion de la Vortaro Japana-Ĉina. S-ro Nakayama bone scias la ĉinan lingvon. Antaŭe, kiam li laboris en la biblioteko de la parto de la universitato en Toyohashi, li multe kontaktiĝis kun Ĵelezo kaj aliaj veteranaj ĉinaj esperantistoj.

Kelkajn jarojn antaŭe li eklaboris en la departemento por alilandaj studentoj en la parto de la universitato en Nagoja.

Tie funkcias la ĉinlingva fakultato, unu-

nura en la universitatoj de Japanio. S-ro Nakayama devis iri al sia laboro, do mi sola ĉirkaŭrigardis la universitaton kaj kune kun kelkaj ĉinaj studentoj lernis en kurso, sper- tante denove universitatan vivon.

Kiam mi revenis en Nagoja, s-ro Nagase Yoshikatsu kondukis min al la fakultato de lingvoj kaj kulturoj de Nagoja-universitato por viziti s-ron Folkmar Koller, kiu instruas tie la germanan lingvon kaj Esperanton. Poste, ni kune vizitis la dekanon de la fakultato. Dank' al lia subteno oni funkciigis E-kurson. Kun granda intereso mi rigardis la monumenton de Yu Dafu, fama moderna verkisto de Ĉinio, nove starigitan en la universitato, kie li iam lernis.

S-ro Takenaka Ĝisuke estis multjara peranto de "El Popola Ĉinio". Kiam mi kaj s-ro Nagase atingis lian hejmon, jam vesperiĝis, tamen ĉe lia pordo ankoraŭ brilis la elpendaĵo kun la vortoj "Takenaka E-Biblioteko". Tuj post kiam ni sidiĝis, s-ro Takenaka montris al ni sian foto-albumon, en kiu estas fotoj faritaj dum lia vizito al la redakcio de "El Popola Ĉinio" kune kun s-roj Nagase kaj Mochizuki en ĝia jubilea jaro 1985, kiam li estis 81-jara. Komence de la 20-aj jaroj s-ro Takenaka eklernis Esperanton. Emeritiĝinte en la 60-aj jaroj, li eklaboris kiel peranto de "El Popola Ĉinio". Dum tiuj pli ol 30 jaroj li faris grandan kontribuon al la distribuado de "El Popola Ĉinio" en



S-ino Yazaki Yoko (meze) intervjuata de raportistoj de Fukuŝima

Japanio. Sur liaj librobretoj troviĝas kompleto da binditaj revuoj de "El Popola Ĉinio", granda kvanto da Esperantaj libroj eldonitaj de Ĉinio kaj nemalmultaj valoraj Esperantaj libroj eldonitaj en frua tempo. Ekde 1997 li ne plu laboras kiel peranto de "El Popola Ĉinio" pro sia granda aĝo, tamen lia kontribuo al Esperanta afero estas gravurita ĉiam en la memoro de ĉinaj kaj japanaj esperantistoj. Ni sincere deziras al li sannon kaj longan vivon.

Mia E-vojaĝo en Japanio dum unu monato lasis al mi multajn belajn rememorojn. Tion mi ŝuldas al s-ro Nagase Yoshikatsu kaj multaj aliaj japanaj esperantistoj, kiuj donis al mi grandajn helpojn kaj prizorgojn. Estas ili, kiuj donis al mi ŝancon multe koni Japanion kaj la japanan E-movadon. Menciindas, ke s-ino Morita Yoko, kiu afable invitis min al Japanio, speciale venis de sia loĝejo en Yatugatake por min adiaŭi. Tio ege kortuŝis min. Kvankam nia kunestado estis mallonga, tamen la afableco kaj amikeco de japanaj esperantistoj restos ĉiam en mia memoro. ■



# esperantistoj (V)



- 1
- 2
- 3

1. La aŭtoro (la dua de maldekstre), s-ro Mochizuki (la unua de maldekstre) kaj s-ro Ikegaya (la tria de maldekstre) kun lernantoj de elementa lernejo en Andou

2. S-ro Takenaka Ĝisuke (dekstre) kaj s-ro Nagase Yoshikatsu kun la unua numero de EPĈ konservata de ili

3. La geedzoj Suzuki kaj ilia filo antaŭ ties verko



## ĈINIO

● Organizite de la Huangshi-a Esperanto-Asocio de Hubei-provinco, la esplora teamo "Piediri tra la nova eŭrazia ponto" kun 7 membroj ekiris de la orienta fino de la ponto en la 1-a de januaro 1999. La 1-an de aprilo ili atingis Lanzhou de Gansu-provinco. Meze de julio ili eliros el Ĉinio tra Alataw-pasejo en Xinjiang kaj atingos en aŭgusto de 2000 Roterdamon, Nederlando. En- kaj eksterlandaj amaskomunikiloj donas grandan atenton al la aktivado.

(Wei Guangliang)

## ĈEĤIO

● Internacia Klubo de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj en Pardubice elkore invitas vin al Internacia Renkontiĝo aranĝota antaŭ SAT-kongreso de la 21-a ĝis la 24-a de julio 1999 en Pardubice. Internacia Klubo de AEH, Na Okrouhliku 953/21, 530 03 Pardubice, Ĉeĥio. (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj)

## FRANCIO

● Internacia Esperanto-Konferenco 1999 okazos en Metz, Francio, de la 17-a ĝis la 23-a de julio. Temo estas "Mono kaj Civilizo". Eblas aliĝi ĉe: <<http://osiek.org/iek/metz99.html>>.

(Bruno Masala, Ret-info)

## LUKSEMBURGIO

● La Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), tutmonda organizo defendanta la rajtojn de la etnaj malplimultoj kaj tiucele uzanta Esperanton, diskutos dum la Universala Kongreso en Berlino Deklaracion, kiu ilustras la teoriajn fundamentojn de etnismo, insistante ĉefe pri la lingva kaj kultura dimensio de la homaj rajtoj, kaj alvokos ĉiujn al kunlaboro. Por pliaj informoj skribu al: Daniele Vitali, 15 a rue de Hesperange, L-1731 Luksemburgio; rete: [ikel@bigfoot.com](mailto:ikel@bigfoot.com)

## NEDERLANDO

● Universala Esperanto-Asocio estas kandidato por la ĉi-jara Humaneca Premio de Hilton. La Hilton-premio, unu miliono da

usonaj dolaroj, estas la plej granda humaneca premio en la mondo, starigita de la Fonduso Conrad N. Hilton por "honoru volontulan, karitatan aŭ ne-registaran organizaĵon, kiu eksterordinare kontribuis al la mildigo de homa sufero.

(UEA, Ret-info)

## POLLANDO

● Ĉi-jare ni festos la 140-an naskiĝ-datrevenon de Doktoro Esperanto kaj ni deziras festi ankaŭ la 40-an datrevenon de funkciado de nia Zamenhof-lernejo. Bedaŭrinde, nia direkto kaj estraro de bjalistoka komunumo decidis likvidi nian publikan lernejon kaj transdoni nian sidejon al privata, romkatolika lernejo. Ni petas ĉiujn geesperantistojn pri helpo kaj perado ĉe ĉiuj bjalistokaj ŝtataj, lokaj urbaj kaj vojevodaj aŭtoritatoj, por ke la lernejo je la nomo Zamenhof ne malaperu el bjalistoka lerneja mapo. Se vi deziras helpi al ni, bonvolu sendi retleteron al: Urbeŝtaro de Bjalistoko s-ro Ryszard Tur: <[city@eksr.ac.bialystok.pl](mailto:city@eksr.ac.bialystok.pl)>, <[bpm@city.bialystok.pl](mailto:bpm@city.bialystok.pl)>, kaj por ke ni sciu pri viaj leteroj al: <[spnr23@polbox.com](mailto:spnr23@polbox.com)>; aŭ per poŝto al: S-ino Nina Pietuchowska, str. Piastowska 13/7, PL-15-207 Bialystok, Polio. (Ret-info)



Brazilaj esperantistoj dum la lasta Verda-Kafo-kunsido en la ĉefurbo Porto Alegre-RS en la 26-a de decembro 1998 (Vaske G. Otto)

## UKRAINIO

● Arta festivalo EoLA okazis 05-09.03 1999 en Kievo. Ĝin partoprenis pli ol 100 homoj el pli ol 20 urboj de minimume 7 landoj (Ukrainio, Pollando, Rusio, Francio, Nederlando, Germanio kaj Belgio). Ĝi havas karakteron de multaj infanoj (ĉ. triono de ĉiuj gepartoprenantoj) el Ukrainio kaj Pollando. (Ret-info)

## USONO

● 47-a Landa Kongreso de ELNA okazos en Sankta-Luiso inter la 24-a kaj 26-a de julio 1999. Vidu <<http://www.geocities.com/1999kongreso.html>> por pliaj detaloj. (Ret-info)

● Ekzistas Esperanto-"Klubo" ĉe <<http://clubs.yahoo.com/clubs/esperanto>>. Per ĝi oni povas afiŝi mesaĝojn, babili, anonci paĝojn. (Ret-info)



La esperantista grupo de Arlezo sur Rodano aranĝos renkontiĝon okaze de la 90-a datreveno de sia fondiĝo. Jen E-propagando de la grupo en septembro 1998. (Gustave Blary)

# INVITO DE HONGKONG

La tuta mondo atentus la evoluon de Hongkong, precipe post ĝia reveno al la patrolando Ĉinio. Estas klare videble, ke la Esperanto-movado en Hongkong pli vigliĝas — la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK) venos al Hongkong en la jaro 2000. Tio estos la dua Azia IJK. La Hongkong-a Junulara Esperanto-Asocio (HKJEA) memstariĝis el la Hongkong-a Esperanto-Asocio (HKEA) en 1998 kaj tuj post tio ĝi montris multflankan agemon. Dank' al la energia laboro de Bill Mak, prezidanto de HKJEA kaj prezidanto de LKK de IJK 2000, mi povas prezenti al vi jenajn enhavoriĉajn raportojn, kiuj helpos vin informiĝi pri la E-movado en Hongkong kaj preparado por IJK 2000.

Yu Tao

## “PERLO DE LA ORIENTO”



Hongkong estas konata kiel “Perlo de la Oriento”, komerca centro kaj renkontiĝejo de la Okcidento kaj Oriento. La unuaj esperantistoj de Hongkong venis al la ĉeftero de Ĉinio en la 30-aj jaroj dum la milito kontraŭ la japana invado. Tiam funkciis la Hongkong-a Esperanto-Asocio kaj eldoniĝis la bulteno “Tagiĝo”. Dum la 80-aj jaroj, intereso de la publiko pri Esperanto revenis al Hongkong. Esperanto estis instruita en kelkaj lernejoj kaj diversaj kursoj. En 1994 fondiĝis la Hongkong-a Esperanto-Asocio. Estas interese, ke ĝiaj membroj estas ne nur Hongkong-anoj, sed ankaŭ samideanoj el Bulgario, Germanio, Usono kaj Japanio. Tio iasence spegulas la internaciecon de la metropolo en la Oriento. Post la reveno de Hongkong al Ĉinio en 1997, HKEA ekhavis pli multajn kunlaborojn kun la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ofte partoprenis diversajn E-renkontiĝojn. La Junulara Sekcio de HKEA regule okazigis semajnfinajn tendumojn, kursojn, konversaciajn rondojn ktp. En junio de 1998, la Junulara Sekcio fariĝis Hongkong-a Junulara Esperanto-Asocio, memstara

asocio agnoskita de la Registaro de la Speciala Administra Regiono (SAR) Hongkong. Kun Bill Mak kiel prezidanto, HKJEA multflanke aktivis por Esperanto, kaj ilia invito de IJK 2000 montras novan progreson de la junulara movado en Azio.

## POR IJK 2000

En decembro de 1998, HKJEA ricevis rajtigon de TEJO gastigi la 56-an IJK dum la somero de la jaro 2000. Tio levis novan atenton pri Esperanto en la komerca kaj financa centro. En februaro de 1999, en grandaj Hongkong-aj ĵurnaloj *Ming Pao* kaj *Da Kung Pao* aperis duonpaĝa artikolo pri Esperanto. *Da Kung Pao*, kun multe da legantoj en Ĉinio, pozitive raportas pri nia lingvo, retrorigardas ĝian disvolviĝon en Ĉinio kaj ĝian kontribuon al interŝanĝo de diversaj kulturoj kaj mencias famajn ĉinajn verkistojn Lusin, Bakin kaj Bing Xin, kiuj mem estis aŭ estas esperantistoj aŭ simpatiantoj de nia lingvo. *Ming Pao*,

Flugfolio farita de HKJEA



unu el la plej gravaj ĵurnaloj en Hongkong, raportas pri funkciado de HKJEA kaj ĝia prepara laboro por IJK 2000. La raporto ankaŭ altiris dekojn da interesatoj al la Esperanto-ekspozicio.

## EKSPOZICII ESPERANTON

La ekspozicio estis organizita de membroj de HKJEA — Bill Mak (prezidanto), Jeffrey Li, Grace Lau, Mandy Chan, Karen Woo kaj Kelly Lau. En la Hongkong-a Politeknika Universitato ili starigis 12 panelojn, kiuj diskonigas diversajn aspektojn de Esperanto ĉefe al junuloj kaj universitataj studentoj. Estis centoj da studentoj, kiuj trarigardis la ekspozicion en semajno. Rimarkindas ankaŭ, ke iuj venis de malproksimaj lokoj al la ekspozicio pro intereso pri Esperanto. Iu 63-jarulino diris: "Vidu mian hararon tute blankan. Mi jam aŭdis pri Esperanto kaj lernis ĝin, kiam mi estis juna."

Hazarde alvenis ankaŭ profesoro Zhou Liuxi (Licius) el la Pekina Normala Universitato. Li estas unu el la fondintoj de la Kantona Esperanto-Asocio kaj en sia universitato en Pekino li gvidis multajn E-kursojn, kiuj kulturis amason da junaj esperantistoj. En la 4-a numero de EPC 1998, nia raportistino Xiang Hong priskribis liajn "romantikecon kaj praktikecon". Li vizitis la Hongkongan Universitaton kiel vizitanta profesoro kaj kaptis la ŝancon multe kontribui al la ekspozicio per abundo da materialoj

pri la antaŭmilita E-movado en Hongkong.

HKJEA ankaŭ produktis belan kolorriĉan flugfolion pri Esperanto, kiu konigas al la parolantojn de la ĉina lingvo pri "la lingvo, kiu povas helpi vian vojaĝon tra la tuta mondo".

## ĈIUJ ESTAS INVITATAJ

La 56-a IJK okazos en julio de 2000 en la Vukajsa Junulara Vilaĝo, kiu estas unu el la plej grandaj junularaj kampadejoj sia-specaj en Hongkong. Pro la agrabla geografia situo de Hongkong, partoprenantoj de IJK 2000 povos kapti la ŝancon viziti multajn belajn urbojn, ekz. Makao, Shenzhen, Guilin, Ŝanhajo kaj Pekino. Ĉiuj estas invitataj, ne perdu la ŝancon por ĝui la orientan kulturon.

La ĉefa temo de IJK 2000 rilatos al tutglobiĝa kulturo, kiu estas unu el la plej elstaraj tendencoj de

nia mondo en la lastaj jardekoj. Do, Hongkong estas ĝuste taŭga loko por diskuti pri tia temo — ĝi estas urbo kun diversaj kulturoj, urbo kun viglaj ekonomio kaj financo, urbo fronte al la plej granda oceano Pacifiko, urbo de Ĉinio, lando kun 5000-jaraj historio kaj kulturo...

Nun fruktodone laboras la Loka Kongresa Komitato. Multaj junaj esperantistoj deziras labori kiel volontuloj por la kongreso. Proponojn kaj demandojn bonvolu direkti al la Hongkong-a Esperantujo:

Hongkong-a Junulara Esperanto-Asocio

P.O. Box 92153, T.S.T. Post Office, Hongkong

Hejmpaĝo: <http://www.esperanto.org/hkjea>

Ret-poŝto: <honkongo@esperanto.nu>

<hkjea@hotmail.com>

Al Bill Mak, prezidanto de HKJEA kaj LKK de IJK 2000:

<bill\_mak@cathaypacific.com>



Yu Tao (dekstre) kaj Bill Mak, prezidanto de HKJEA

B8

HKJEA  
diskonigas  
Esperanton en  
Da Kung Pao.

# 什麼是世界語?

## 世界語國際青年營明年在港舉行

月 號

多萬人說世界語, 世界語是一種擁有一百多年歷史的簡單易學而國際通用的人工語言, 她小卻屬...

一日在理人舉行的世界語展覽, 將介紹世界語發展資料, 大家可從中了解到世界語創始人的背景和歷史。另外也展示不同國家和地區印製的世界語讀本、刊物、課程、字典、地圖、故事書等。香港兩個世界語協會的成員, 也如「聯合國」, 來自不同地方, 如新西蘭、日本、馬來西亞、保加利亞、英屬、中國內地、美國、智利等地, 要加入成為一分子可開始學習世界語, 只需填妥報名表及繳交一百元年費。香港青年世界語協會通訊部地址: 香港九龍尖沙咀郵政信箱九二一五三號。電郵地址: [hankunua@esperanto.nu](mailto:hankunua@esperanto.nu)

甚至有人估計達一萬種, 如果與不同的語言與不同地區的人溝通, 誰約不知要學到何年何月了。大家都認同, 只要學一種語言, 大家都能以此作為共同的溝通工具, 但是, 無論是用中文、英文、法文、阿拉伯文, 對不同地方的人來講, 都有個共同的缺點, 那就是每個人都要學...



# La Nova Realismo

## — la konsekvenco de la Nova Pensado

*“La Nova Realismo” de s-ro Bruno Vogelmann estis eldonita en la germana lingvo en 1988. Ĝi aperis libroforme en 17 lingvoj, inkluzive la ĉinan lingvon kaj Esperanton. La aŭtoro havas riĉajn travivaĵojn kaj multe studas problemojn pri socio, ekonomio kaj filozofio. La Nova Pensado, kiun li pritraktas en sia libro, estas nova pensmetodo, kiu direktos la evoluon de la homaro al novaj, pli altaj ŝtupoj, kaj havas gravan signifon por nia reala vivo. Ni aperigas lian artikolon ĉi-sube kaj samtempe gratulas lin pro la 90-a datreveno de lia naskiĝo en la 30-a de julio.*

La Red.

de BRUNO VOGELMANN

### Prezentado de noveca mondkoncepto

ROBERT JUNGK, la fama pacesploranto kaj futurologo, juĝis pri la “Nova Realismo”: “Tio estas la mondkoncepto de la estonteco.” Per kio tiu eldiro pruvitas?

Fakto estas, ke la homoj vivas disigitaj en multaj grupoj: popoloj, klasoj, sociaj tavoloj, partioj, mondkonceptaj kaj religiaj. Ĉiuj tiuj grupoj defendas apartajn interesojn kaj volas realigi siajn grupajn celojn. Tia konduto ofte kaŭzas rezulton, per kiu unu parto venkas kaj la alia venkatas. En tia rezulto ekzistas jam nova ĝermo de estontaj konfliktoj. Certe necesus solvojn, kompromisojn, kiuj konsideras la interesojn kaj bezonojn de ĉiuj partoj, por ke ili garantias longdaŭran solvon, kiu helpas certigi la pacon.

La koncepto de grupo ofte malbligas tian solvon per deklaro de la grupa koncepto eterna kaj neŝanĝebla veraĵo. Tian deklaron, kies enhavo de vereco normale ne estas kontrolebla, ni nomas dogmo. Tia dogmismo kaŭzis regule dum la historio perfortregadon kaj netoleremon kun sekvo de terura subpremo. Milionoj kaj milionoj da homoj perdis pro tio liberecon kaj vivon.

### Neceseco de nova mondkoncepto



La aŭtoro

Ĉar ĉiuj tiuj diversaj bezonoj kaj interesoj rezultigas mondkonceptojn kontraŭdirajn unu al la alia, estas tempo ke la homoj ricevas komunan bazon por komuna pensado. Tia bazo estas komuna mondkoncepto, por ke ili kapablu komune kaj harmonie agi. Ili devas lerni, pensi ne nur pro momenta avantaĝo, se konflikto estas solvenda. Ĉar ĉiam, kiam ni altrudas al partnero tian solvon, kiu ne konsideras ankaŭ liajn interesojn, ni semas la ĝermon por nova estonta konflikto.

Por kapabliĝi je tio, necesas la Nova Pensado, kies “regulojn” mi prezentas en miaj “5 principoj.” Ti-

ujn la homoj devas ensorbi en sian konscion, plejeble jam en lernejo, por ke ili dum sia vivo kapablu trovi per ĝusta, viva pensado daŭremajn solvojn, kiam ili havas problemojn kun kontraŭuloj, konkurantoj kaj partneroj. Tia Nova Pensado kaŭzas fine la sintenon de Nova Realismo, kiu sola povas esti la mondkoncepto de prospera fruktodona estonteco.

### La Nova Pensado

Ĉar al pripensemaj homoj konsciiĝis dum la lastaj jardekoj, ke ni devas esti pli ĝisfundaj, estiĝis la nocio de “Nova Pensado”. Ekde 1980 multaj menciis la vortojn “Nova Pensado”, kvankam supoze-



ble preskaŭ ĉiuj tiuj tute ne sciis kio estas la Nova Pensado. Por ili "Nova Pensado" ŝajnis iom pli afa-bleco, iom pli preteco intertrakti, iom pli medioprotekto kaj iom pli pacamo. Sed la Nova Pensado estas pli. Ĝi posedas proprajn regulojn kaj aliel ol la "Malnova Pensado" kun ĝia denaska logiko la Nova Pensado estas viva pensado. Ĉar la denaska logiko rezultigas ofte miskonkludojn, pro la denaska logiko, kiu utiligas nur la linearan kaŭzecon.

La Nova Pensado atentis kaj utiligas la interplektitan kaŭzecon, kiu ne nur atentis linearan ĉenon de kaŭzoj kaj efikoj (A kaŭzas B, B kaŭzas C, C kaŭzas D...), ĝi atentis ankaŭ ĉiujn kromkaŭzojn kaj kromefikojn, kiuj estas tre ofte pli gravaj ol la konstatita lineara efiko. Ekzemplo: En la industria kamenfumo oni observis unue nur la ĝenan fulgon. Nur multe pli tarde oni konsciiĝis, ke la kromefike elpuŝata CO<sub>2</sub>-gaso rezultigos estonte iom post-ioman plialtigon de la tera temperaturo kaj fine nocan malbonigon de la tera klimato (varmdomefekto).

Per atento je tiaj "interplektitaj" kaŭzoĉenoj la racio esploras la fenomenojn de la realeco kaj la racio trovis tiamaniere la 5 fundamentajn leĝecojn, kiujn ni nomas la principoj de la Nova Pensado:

1. la principo de la ĉiama movo kaj ŝanĝiĝo
2. la principo de la ĉiuflanka interligiteco
3. la principo de la unueco de la kontrastoj
4. la principo de la inversiĝo de kvanto en kvalito kaj male
5. la principo de la suprenevoluo en korelacio de neceso kaj hazardo

Tiuj principoj estas samtempe la principoj de la subjektiva dialektiko, kiu por la homa pensado estas nura pensmetodo. Samtempe tiu dialektiko estas ankaŭ la doktrino de la ĝeneralaj movoleĝoj en naturo, socio kaj pensado, do objektiva dialektiko.

Tiu viva dialektika pensado ne estas tute nova invento. Saĝaj homoj malkovris tiujn principojn ĉiam denove dum la praktiko de ilia vivo kaj utiligas ilin. Ekzemple la Unua Principo devenas de antikva filozofa Heraklito, kiu eldiris: Pantha rei — ĉio fluas!

Precipe en la nuna tempo, dum kiu la evoluo de scienco, tekniko kaj de la sociala sektoro akcelitas enorme, la atentado de tiuj principoj estas tute grava rilate la prosperon kaj pluekzistadon de la homoj. Aparte grava estas la principo de la inversiĝo de kvanto en kvalito kaj male. Simpla ekzemplo el fiziko: Se oni aldonas al akvo de 20°C certan varmokvanton, la temperaturo altiĝas ĝis 21°C. Tion ripetante, la akvo varmiĝas pli kaj pli kaj atingas fine 100°C. Laŭ la denaska logiko de la Malnova Pensado la temperaturo de la akvo pro plua aldono de varmo devus nun plialtiĝi je 101°, 102°, 103°C.... sed ĝi devus resti akvo. Fakte, ĉe 100°C la akvo ŝanĝiĝas en vaporon de 100°C, kiun ni povas varmigi plu kaj kiu, se enfermita en kaldrono, fine eksplodigas la kaldronon. Simila inversiĝo kun danĝeraj sekvoj povas en futuro kaŭzi subitajn katastrofojn pro daŭraj pekoj kontraŭ la ĉirkaŭmondo, ekzemple rilate atomreaktorojn, rilate ozontruon, rilate varmdomefekton, kaj rilate multajn aliajn.

Mi skribis en mia libro apartan ĉapitron por ĉiu el la 5 principoj de la Nova Pensado kaj montris multajn ekzemplojn por ĉiu principo. Tion mi faris intence, ĉar ĉiu principo en sia kurta klara teksto laŭvorta ŝajne estas tro simpla, tro klara, tro memkomprenebla ol instigi la leganton pripensi la principon. Ĉiu leganto ja devus pruvi por si mem la validecon kaj taŭgecon de la principoj per mem serĉataj ekzemploj. Nur per tia esploro la propra pensado iĝas pli fruktodona, pli viva kaj pli sukcesa, iĝas Nova Pensado.

Tiu Nova Pensado — se konsekvence ekzercata kaj praktikata

— direktos la evoluon de la homaro al novaj, pli altaj ŝtupoj. Verŝajne la plej grava problemo de tia evoluo estas la vekigo de nova sencokoscio, do de nova religieco. Ĉar nur el vera, mi kaj mondon inkludanta sencokoscio en la homo elkreskas la sinteno de responsemo por fruktodona vivo. Bedaŭre tia sencokoscio, do vera religieco rariĝintas pli kaj pli, ĉar en nia socio regas la ekonomika pensado, kaj la strebado al plejeble granda profito iĝis la preskaŭ ĉion dominanta sinteno.

### Religio kaj la Nova Pensado

Certarilate Nova Pensado efikas jam de longtempe, kvankam sen klara conscio de la 5 principoj. Seriozaj religioj konstatis ofte ke eklezio kaj doktrino certgrade rigidiĝis kaj ke multo el la eklezio ne plu estis en harmonio kun la bezonoj de la homoj. Tial post 1945 faratis tre konscie klopodoj de renovigo kaj de pli profunda interkompreno ekzemple per la "Interparoloj de SALZBURG-Aŭstrio, kie inter la Katolika Eklezio, reprezentata de Kardinalo KÖNIG el Vieno unuflanke kaj de deciditaj ateistoj aliflanke, reprezentataj de la franca aŭtoro ROGER GARAUDY, komenĉiĝis dialogo kun la celo trovi komunon en disiganto. La rezulto ankoraŭ ne estis kontentiga.

Ĉar ne povas tolerati, ke du tiom gravaj partoj de la homaro, kiel unuflanke la tradiciaj kredantoj kaj aliflanke la sencokonsciaj ateistoj, troveblaj en multaj sociaj tavoloj prefere inter la intelektularo, batalas unu kontraŭ la alia kaj disipas multe da energio en batalo kaj kverelo kaj ofte rifuzas kunlaboron. Male necesus urĝe veki veran sencokoscion kaj responsemon en la homoj de la industriaj landoj, de kies konduto dependas la bonfarto de la Tria Mondo.

Nuntempe la materiala kaj nurekonomika pensado de la homoj precipe en la industriaj landoj igas forgesi, ke ili ne nur naskitas por havi kaj ĝui, sed ke ĉion, kion ili havas kaj kio ili estas, ili dankas

al tiuj kaj al tio, kio estis antaŭ ili. Estante ĉeneroj en la senfina ĉeno de la vivo ili havas la taskon konservi kaj kreskigi la ricevitaĵon. Nuntempe la tradiciaj kredantoj kaj la seriozaj ateistoj ne plu rajtas batali unu kontraŭ la alia, sed devas komune klopodi veki en la tepiduloj, en la ĝuemuloj, en la havemuloj la necesan sencokonscion.

Kiel realigi tion, kion mi montras en mia verko "La Nova Realismo"? Pri tiu propono Dr. ELISABETH PETER de la "Sekretariejo por la Nekredantoj" ĉe Vatikano en Romo diras: "Jes, ankaŭ mi opinias, ke seriozaj homoj el diversaj kredoj kaj mondkonceptoj laboru kune por la vekigo de nova vivosenco en la homo kaj ke ili konduku lian vivon for de ĝuemo kaj superfikciemo — al nova sencplena estado."

### **Kio estas vivo?**

Ni menciis, ke la homo estas ĉenero en la ĉeno de la VIVO, estanta de la plej frua pasinteco ĝis la lontana estonteco kaj ke ĉiu homo tion, kion li havas kaj kio li estas, dankas al la pasinta vivo, ke estante ĉenero li havas la taskon konservi kaj kreskigi la ricevitaĵon por ke la vivo atingu ŝtupojn ĉiam pli altajn.

Tiu VIVO ampleksas ne nur la vivon de planto, besto kaj homo, sed laŭ Budho kaj laŭ hindaj pensuloj ĝi ampleksas ĉion, kio movas sin kaj ŝanĝiĝas, kio ĉiuflanke interligatas, evoluas, naskas ĉiam novon kaj strebas al nekonata celo. Al tiu granda ĉion inkluda vivo apartenas la neorgana mondo de atomoj, molekuloj kaj steloj, la basa organa mondo de plantoj kaj bestoj, la animata mondo de pli altaj bestoj ĝis la raciodonita mondo de la homo kaj krome ĉio, kio trovas en la granda kosmo. Tiu granda VIVO estas la plej alta valoro, kiun ni konas. Tiu koncepto estas identa kun la koncepto de la tradiciaj kredantoj pri la Persona Dio, la kreanto de ĉio, kion konfirmas Majstro Eckhart (1260-

1328) en sia "prediko pri saĝeco" je la demando "Kio estas la vivo?" per la vortoj: "VIVO estas la esenco de Dio!"

### **La etiko de la Nova Religieco**

El sia kredo la tradicia kredanto akiris la konscion de la senceco de la monda proceso, kiu kreas de Dio kaj kiu pasas laŭ Dia Volo al celo destinita de Dio kaj finiĝos iam en Nova Dia Regno.

La science pensanta homo konas kaj spertas la konscion de la senceco de la monda vivoproceso el la superrigardo super la riĉa evoluo de ĉiu vivo.

Ambaŭ scias ke la homo vivas meze de tiu granda mondoproceso, unu laŭ Dia Volo, la alia laŭ la neceseco de la vivo. Ambaŭ scias, ke ili estas ĉeneroj en la granda ĉeno de la vivo kaj devas konservi, kreskigi kaj plu-doni kion ili ricevis kaj kio ili estas. Tio signifas ke ili devas plenumi tiun taskon donitan laŭ unu de Dio, laŭ la alia de la neceseco de la VIVO.

Ambaŭ rigardmanieroj estas esence identaj. Ili aperas kvazaŭ en paraleleco, unue en la granda Duobla Ordon de Jesuo kaj poste en la vivomaksimo de la Nova Realismo kaj estas la bazo de la nova etiko.

### **La Nova Realismo**

Mi resumas en mia libro la esencajn ideojn de la Nova Realismo en 47 tezoj. Pli kurte ni povas diri:

La Nova Realismo estas mondkoncepto super ĉiuj aliaj mondkonceptoj kaj religioj, ĉar ĝi ne rifuzas iun, escepte se ĝi estas vivodetrua. Kontraŭe ĝi inkludas ĉiujn, ĉar ĝi rigardas ilin historie kreskintaj rigardformoj de tio, kion ni konis kaj spertis ĝis nun nur neperfekte.

Tial la Nova Realismo estas ankaŭ mondkoncepto por ĉiuj homoj, ĉar ĝi ne postulas de iu la rezignon je lia ĝisnuna mondkoncepto aŭ religio. Ĉiu tia ja estas ĝusta en ĝia historie kondiĉita senco. Diferencaj estas nur la nocioj, la moroj kaj la kutimoj de ĉiu religio kaj mondkoncepto.

La Nova Realismo jesas rilate la evoluon de la homa socio la realigon de la demokratio, de la socia justeco, de la konservado de la naturo, de plej bona edukado kaj klerigo de ĉiuj homoj, de la favorigo de scienco kaj arto, de la certigo de la Homaj Rajtoj kaj Devoj, de la internacia certigo de la paco.

La Nova Realismo estas konservativa, ĉar ĝi volas konservi la konservindaĵon.

La Nova Realismo estas progresema, ĉar ĝi volas realigi la necesan novon.

La vivomaksimo de la Nova Realismo tekstas laŭ tezo 46:

*Agu tiel, ke la celdirekto de via volo estas ĉiam en harmonio kun la konservado kaj suprenevoluo de la vivo!*

Tiu vivomaksimo estas identa kun la granda Duobla Ordon de Jesuo, kiel nomitas Jesuo Kristo dumvive:

*Vi devas ami Dion el via tuta koro, el via tuta animo, el via tuta menso kaj vi devas ami vian proksimumon kiel vin mem!*

Ĉar Dio estas VIVO, kaj VIVO estas laŭ Majstro Eckhart egala al la Esenco de Dio. Via proksimumo estas kiel vi parto de la granda vivo, kiun ni devas konservi, kreskigi kaj levi sur pli altan ŝtupon.

Fine la Nova Realismo estas alvoko al la racio, kiu konas, juĝas kaj agas, sed ankaŭ alvoko al la animo, al la koro de la homo, kiu sentas kaj partoprenas je ĉio, kio okazas.

Sen Nova Realismo la gvidantoj kaj responsuloj inter la homaro ne kapablos regi tiel, ke la malbonoj malpliĝas kaj militoj ĉesas.



Per Nova Realismo ili kapablos trovi konfliktevitajn solvojn por ĉiuj problemoj kaj kapablos realigi bonfartron, sanan naturon kaj pacon.

Nia celo: pli alta ŝtupo de nia vivo! ■

# Ceramikisto kaj liaj verkoj



Xing Liangkun naskiĝis en Shandong-provinco, Ĉinio. Ekde sia knabeco li ŝatas kolekti artaĵojn. Li estis kolektanto de japanaj ceramikaĵoj. Dum la pasintaj 12 jaroj li studis la ĉinan ceramikon kaj akiris grandan sukceson. Ofte okazas ekspozicioj de liaj verkoj aŭ kolektaĵoj. Liaj verkoj estis laŭdataj de specialistoj kaj kolektitaj de en- kaj eksterlandaj amatoroj.



# Judoj en Ŝanhajo dum la Dua Mondmilito

de JIN LING

**S**INJORO Chen Yifei estas fama ĉina pentristo enmigrinta en Usonon. Sinjoro Hammer, mastro de la Internacia Galerio Hammer de Usono alte taksis lian talenton kaj fariĝis lia unua makleristo. Hammer estas judo, sekve multaj riĉaj judoj fariĝis klientoj de Chen. Tiu, kiu instigis Chen Yifei al serĉo de la "ŝanhajaj judoj", estis neniu alia ol sinjorino Aisad, onklino de s-ro Hammer.

Foje s-ino Aisad gastigis Chen Yifei. S-ro Chen estis surprizita, ke la mastrino salutis lin en pura ŝanhaja dialekto: "Vi estas ŝanhajano, kaj ankaŭ mi estas ŝanhajano." Tio estis la unua fojo por li, ke usonano sen ĉina sango parolis en ŝanhaja dialekto ekster Ĉinio. S-ino Aisad rakontis al li sian sperton antaŭ 60 jaroj.

Tio okazis komence de la Dua Mondmilito. Tiam nazioj brutale persekutis la judojn kaj ĉiuj judoj estis en danĝero. La pasportoj de la judoj surhavis ruĝan literon J. Britio, Usono, Aŭstralio kaj Francio ne akceptis fuĝantajn judojn, kaj Nederlando akceptis nur infanojn, do ĉirkaŭ 30 000 judoj migris surtere aŭ surmare al Ŝanhajo, "mistera urbo en Oriento". Poste parto el ili revenis al sia naskiĝloko, aliaj migris en Sud-Amerikon kaj Kanadon, kaj triaj restis en Ŝanhajo...

Sinjoro Chen diris, ke la agitiĝo en lia koro estis neesprimebla, kiam li aŭdis la fuĝadon de la judoj al Ŝanhajo. Li subite eksentis, ke li estis fremda al la urbo, kie li iam vivis, ke la urbo havas tiom imponan paĝon en sia historio. Li decidis registri kaj reaperigi la pecon de la historio. Poste li akiris ŝancon fari filmon. Li uzis la monon akiritan de aŭkcio de liaj pentraĵoj kaj faris dokumentan filmon "Fuĝo al Ŝanhajo" kaj televidan filmon "Arkeo

de Ŝanhajo", kiuj rakontas pri la 30 000 judoj protektataj en Ŝanhajo dum la Dua Mondmilito.

Ekde 1995 s-ro Chen kaj lia filmista grupo vizitis multajn lokojn por intervjui judojn fuĝintajn al Ŝanhajo aŭ iliajn posteulojn. Inter ili estis s-roj Isaac Stern kaj Greenberg, la unuaj violonistoj de la Berlina Filharmonia Orkestro kaj la Viena Simfonia Orkestro.

La judoj enmigrintaj en Ŝanhajon starigis siajn plansettlejon kaj lernejon, kaj la lokanoj nomis ilian lokon "mikro-Vieno". Multaj el la enmigrintoj estis muzikistoj, 15 estis dirigentoj kaj pli ol 200 muzikiludistoj. Stern kaj Greenberg ja kreskis en tiu medio. S-ro Chen diris: "Stern venis al Ŝanhajo en knabeco kaj poste iris al Harbin, Nordoriento de Ĉinio. Li estis obstina. En Germanio li insultas ĉiun, kiu sintenas malamike al Ĉinio."

10 membroj el la familio de Greenberg rifuĝis en Ŝanhajo kaj eskapis de la fatalaĵo, dum aliaj 40 membroj de la familio estis pereigitaj de nazioj. Greenberg venis al Ŝanhajo en la aĝo de 5 jaroj. Lia patro estis komercisto de ŝtofoj. Sed en la unuaj tagoj de lia vivo en Ŝanhajo li laboris kiel farunotransportisto, kaj la patrino — tajlorino. 8-jara, Greenberg suferis de poliomyelito kaj post lecionoj li ĉiam aŭskultis muzikojn hejme. Li adoris Jascha Heifetz, do la gepatroj aĉetis por li violonon. Li ofte ludis violonon kune kun najbara violonisto en restoracioj por perlabori panon. Post kelkaj jaroj li fariĝis disĉiplo de majstro Widenberg, judo enmigrinta en Ŝanhajon.

S-ro Chen legis multajn rememoraĵojn kaj vizitis multajn etnologiajn institutojn. Por kompletigi siajn filmojn "Fuĝo al Ŝanhajo" kaj "Arkeo de Ŝanhajo", por ke la postvivantaj judoj povu refoje viziti Ŝanhajon, s-ro Chen decidis inviti postvivantajn judojn aŭ iliajn

posteulojn reviziti la urbon.

La vizitgrupo konsistis el 20 personoj. Tiuj judoj nomis la viziton "hejmenreveno". Ili kunportis fotojn, serĉis la konatajn domnumerojn, ŝtuparojn kaj pordojn. Foje kaj foje ili parolis kelkajn vortojn en ŝanhaja dialekto kaj larme rememoris la pasintaĵojn. Usona entreprenisto s-ro Dudney revenis kune kun filino. En la domo de la mastro li rimarkis, ke la mastro ankoraŭ konservas lian seĝon kun aĵura apogilo. En emociiĝo li petis, ke li povu reporti la seĝon hejmen. La dommastro diris: "Certe vi rajtas, ĝi ja estas via proprietaĵo." Malsuprenirante el la domo, li renkontis konatan barbiron. La 77-jara barbiro interparolis kun Dudney en flua angla lingvo, kio multe emociis la ĉeestantojn.

S-ro Blumen Seil siatempe loĝis en numero 67, Zhoushan-strato. Lia laboro estis porti panon al klientoj kaj la rekompenco al li estis duono da kruda pano. Sed li domaĝis manĝi kaj ŝanĝis ĝin kontraŭ ĉiutagaj bezonaĵoj. Li diris: "Kvankam ni estis malriĉaj, tamen ni trovis la unikan rifuĝejon. Tiam neniu loko en la mondo estis malfermita al ni, sed Ŝanhajo akceptis nin, kvankam ĝi mem estis en grandaj malfaciloj."

75-jara s-ino Rena Clas loĝis en Ŝanhajo en la aĝo de 10 jaroj. Vizitante Ŝanhajon ŝi kunportis la foton de la gepatroj, por ke ankaŭ ili povu "reviziti" la "hejmlokon". Ŝi diris: "Ŝanhajo savis judojn, kaj tio ŝanĝis mian komprenon pri la mondo. Tiam la ŝanhajanoj estis pli malriĉaj ol ni, sed ili neniam ekskluzivis judojn. Tio ja estis eksterordinara bonfaro."

Multaj kaj multaj valoraj scenoj estis filmitaj. S-ro Chen jam neglektis la problemon de superelspezo, ĉar li bone sciis, ke pli kaj pli malmultiĝas la postvivantaj judoj, kiuj iam vivis en Ŝanhajo. La tempo jam ne permesas al li sin malstreĉi, kaj krome li tre volis restigi al Ŝanhajon valoran kaj fierindan. Fakte tio jam ne estas lia persona konduto, ĉar tiu peco de la historio de Ŝanhajo estas ĉiam memorenda ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo. ■

# Ĉjang-oj ŝatas kapveston

Junulino brodanta



Fotoj de XUE CHAO kaj LADU

Ĉjang-oj plejparte loĝas en montregionoj de la Maowen-a Ĉjang-nacia Aŭtonoma Gubernio de Si-chuan-provinco. Sen propra lingvo, ili uzas la han-an.

La vestoj de ĉjang-oj estas originalaj, simplaj kaj belaj. Ĉu viroj ĉu virinoj, ĉiuj portas longan veston faritan el katuno kaj longan veŝton el ŝaffelo aŭ kotona teksaĵo, kun kapvesto kaj krurzonoj.

Virinoj amas borderi veston per brodaĵo kaj inkrusti kolumon per arĝentaj ornamaĵoj similaj al ume-floro. Ili plejparte portas broditajn zonojn kaj ŝuojn kun elstara pinto, orel- kaj kolringojn, harpinglojn kaj aliajn arĝentajn ornamaĵojn.

Ĉiuj ĉjang-oj, ĉu viroj ĉu virinoj, portas kapveston nigran aŭ blankan. La kapvestoj de virinoj estas ankaŭ buntaj, ofte kun koloraj brodaĵoj.



Ĉjang-ol kamparanoj



Junaj virinoj en ĉjang-aj vestoj



Ĉjang-a junulino en vintra vesto



Virinoj en vestoj por laborado



Virinoj en ordinaraj vestoj



Ĉjang-oj en festaj vestoj

# Hejmloko de orharaj simioj

Teksto kaj fotoj de CHENG WEI-DONG

**F**ORLASINTE Meili-neĝmonton, ni devigite ĉirkaŭveturis al Weixi-gubernio pro terŝoviĝo ĉe la ŝoseo, kiu kondukis rekte al la loko.

## EL PLUVO KAJ EN NEĜON

Sur altebenaĵo la vetero en aŭtuno kapricas kaj malsamas en lokoj kelkajn kilometrojn distancaj inter si. Kiam ni ekveturis, pluvetis kaj la temperaturo evidente malleviĝis. Kvankam ni portis ĉiujn vestojn, tamen ni ankoraŭ ne povis varmigi nin.

La aŭto malrapide veturis kaj de tempo al tempo flankenŝoviĝis sur la zigzaga montŝoseo malseka, pro tio la ŝoforo estis ege atenta. Kiam la aŭto veturis pli ol 40 km., ĉesis la pluveto, sed antaŭ ni densis blanka nebulo sur la monto. Kiam ni plue veturis, falis lanugaj neĝflokaj. Ni tuj eniris kvazaŭ de pluva aŭtuno en frostan vintron. La ŝoforo diris al mi, ke tie estas forko de Baimang-neĝmonto je kvar mil m. super la marnivelo, la plej alta loko dum nia vojaĝo.

Pli kaj pli densis la neĝo. Nia aŭto solece veturis sur la senlima neĝ-altebenaĵo ege glitiga. En neĝo ni ne povis klare vidi la ĉirkaŭaĵon. Ni devus halti por sate ĝui la neĝon tre raran en septembro, tamen neniu el ni havis tian humoron pro forta timo pri la danĝera vojo, malgraŭ ke neniu tion konfesis. Ni ĉiuj povis fari nenion alian krom resti en la aŭto, forte teni la apogon per ambaŭ manoj kaj larĝe malfermi la okulojn kun la koro streĉita.

## SEN SPURO DE ORHARAJ SIMIOJ

Unu el la tri aŭtonomaj gubernioj sub la Diqing-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco portas la nomon Weixi. En Ĉinio ĝi estas unika aŭtonoma gubernio kun lisuoj kiel ĉefa loĝantaro. Laŭ historiaj notoj de la gubernio, ĝi havas longan historion. Jam en neolitiko tie vivis kaj laboris homoj. Historie, oni multfoje ŝanĝis ĝian apartenon. Nur en 1931 oni starigis Weixi-gubernion kaj en 1985 ĝi fariĝis la Weixi-a Lisu-nacia Aŭtonoma Gubernio. En la malgranda guberniurbo de Weixi preskaŭ ne troviĝas ebenejo, ĉar ĝi sidas sur granda montdeklivo. Enurbigante, nia aŭto devis malrapide rampi supren kun granda peno.

Weixi renomiĝis iagrade pro orharaj simioj. En la loko prosper-



Lignaj konservajoj de lisu-oj


as arbaroj kaj trafluas Lancang-rivero. Dank' al siaj verdaj riveroj, prosperaj montaroj kaj interkruĉantaj valoj Weixi fariĝis hejmloko de orharaj simioj viglaj, amindaĵaj kaj grupigemaj, kiuj estas primatoj propraj al Ĉinio kaj estas rigardataj kiel raraj animaloj de la mondo tuj post grandaj pandoj. Ili troveblas en tre malmultaj lokoj. Kvankam Weixi estas ĉefa vivloko de orharaj simioj, tamen tie tre malmultaj havis ŝancon vidi ilin propraokule pro la tereno komplika kaj arbaroj densaj. Mi dufoje eniris en la montaron por serĉi ilin, sed vane. Mi nur aĉetis kun bedaŭro ĉe lokano foton pri ili kiel memoraĵon.

## GASTADO EN LISU-A VILAĜO

Tongle de Yezhi-subgubernio estas tipa lisu-a vilaĝo. Kvankam







Orharaj slimoj



Interkruciĝo de riveroj

ĝi estas nur ses km. for de la subgubernia urbeto, tamen por atingi ĝin, ni devis fari grandan penon, ĉar ĝi kuŝas sur monto. Ĉirkaŭ ĝi verdas arboj kaj sur la montdekklivo apud ĝi staras stakoj de tritika pajlo. Enirinte en la vilaĝon, mi tuj estis kaptita de tipaj naciaj moroj. La loĝdomoj ĉu altaj ĉu malaltaj ĉiuj estas konstruitaj el tabuloj aŭ arbotrunkoj. En la supra etaĝo loĝas homoj kaj en la malsupra — brutoj.

En la vilaĝo vivas pli ol cent familioj, el kiuj nur unu estas naŝi-a kaj la aliaj — lisu-aj. La vilaĝanoj estas afablaj kaj gastamaj. Informiĝinte pri nia alveno, ili ĉiuj sin vestis per naciaj vestoj, kiujn ili portis nur en festaj tagoj, sin beligis per ornamaĵoj el konkoj kaj arĝento. Kolektiĝinte sur la ununura ebenejo antaŭ la vilaĝa lernejo, ili dancis naciajn dancojn por nin

bonvenigi. Kantante, ili dancis kun pli kaj pli granda gajeco. Varmiĝintaj, ili demetis jakon, kaj soifantaj, ili trinkis iom da vino mem farita. Ili profunde impresis min per senĝeneco kaj libereco.

La subgubernia respondeculo, kiu akompanis nin, diris, ke la spektaklo videblas nur en festaj tagoj. De li mi informiĝis, ke la plej grava festo de lisu-oj estas la Novjara Festo, kiu okazas ĉirkaŭ la vintra solstico. Ili festas ĝin per buĉado de porkoj kaj ŝafoj, farado de vino kaj kukoj el glueca rizo. La festado daŭras tri tagojn, kaj la


vilaĝanoj ĉu junaj ĉu maljunaj gaje sin amuzas per kantado kaj dancado tra la tutaj noktoj. Mi estis profunde emociita de iliaj sincereco kaj honesteco. Por danki ilin,

mi aĉetis vinon, cigaredojn kaj bombonojn por regali ilin kaj fotis ilin.

Forlasinte la vilaĝon, ni daŭre veturis suden laŭ Lancang-rivero. Pasante tra la vilaĝo Fuchuan, ni vidis de malproksime homfluron kun centoj da brutoj ĉe la rivero. Jen bazaro de brutoj multe konata en la loko. Sed ni ne sciis, kiel ĝi formiĝis kaj kiel iris ĝia komercio. Laŭdire, en antikva Ĉinio tie estis fama vojo por ĉevalaj karavanoj kun teo, kiun oni nomis ankaŭ Silka Vojo en sudokcidenta Ĉinio. Imageble, brutoj ludis gravan rolon en la tieaj terkulturado kaj trafiko. ■



Bazaro de brutoj



Lisu-a virino





Lisu-oj en sia loĝejo



Vilaĝo de lisu-oj





de PANG NAIYING

**L**A antikva urbeto Jiajiang renomiĝis per sia papero farita el bambuo. Tia papero blanka kaj supla, glata sed ne glita, netralasebla por inko tre taŭgas por pentrado kaj kaligrafado per peniko. Jiajiang situas ĉe la okcidenta rando de la baseno Sichuan. Sur la Milbudha Roko okcidente de la urbeto klare videblas smeralda rivero borderita de verdaj montoj, sur kiuj prosperas bambuoj. Tio eksplikis la devenon de la nomo de la urbeto kaj malkovris la misteron de la mil-jara naturdotita paper-urbeto. Ĝuste tiu smeralda rivero kun travidebla akvo nutras la tieajn bambuojn, materialojn de papero. Pro tio oni nomas la paperon produktitan en Jiajiang ankaŭ bambua papero.

Antaŭ pli ol 2 400 jaroj ĉinoj skribis sur bambuaj slipoj. Kiam Konfuceo legis "Yi Jing", rompiĝis en tri partojn la bova tendeno, kiu kunligis la bambuajn slipojn, pro

senĉesa turniĝado de pezaj paĝoj. Kaj la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.) legis ĉiutage oficialajn dokumentojn pezajn je 60 kg... Kia mirinda evoluo de bambuaj slipoj al papero el bambuo! Jiajiang-anoj diris, ke ilia majstro estis Cai Lun. Antaŭ li, oni skribis sur silkaĵo, kiu estas multe pli malpeza kaj oportuna ol bambuaj slipoj kaj multekosta. Poste oni inventis malkaran paperon el lino, sed tia papero estas tre kruda kun multe da neapartigataj fibroj kaj ne taŭgas por skribado. Antaŭ 1 800 jaroj Cai Lun renovigis la teknologion de kirlado de pasto kaj farado de papero el uzitaj lino, tolo kaj fiŝreto. Li inventis paperon ankaŭ el arboŝelo tre taŭgan por skribado. La papero estis bonkvalita kaj malmultekosta. 400 jarojn post tio, Jiajiang-anoj faris paperon el bambuo kun fibroj malmolaj kaj rompiĝemaj, postulantan pli altan teknikon. Pro tio la naskiĝo de la papero el bambuo markis alian gravan evoluon en paperfarado de

Ĉinio. En la 17-a jc., Jiajiang-papero kun bona kvalito ja servis kiel tributo por kortegaj ekzamenoj. Kaj Jiajiang-anoj ŝuldas tion al siaj prapatroj. Ĉiujare ili kultas siajn prapatrojn sur la Milbudha Roko. En la difinita tempo tie kolektiĝas miloj da paperfarantoj kun paperoj el bambuo. Post la kultado ili interŝanĝas la teknikon de paperfarado. Tiam okazas ankaŭ komercado de papero. Jiajiang-paperon foren transportas aŭtoj sur ŝoseo, bambuaj flosoj sur rivero kaj ĉevalaj karavanoj en monto...

Pli ol 2 000 Jiajiang-aj paperfarantoj loĝas en montaro nordokcidente de la urbeto. Hodiaŭ ili faras paperon ankoraŭ per simplaj antikvaj iloj el ŝtono, ekz., ŝtonaj pistuoj, kirluoj kaj eĉ marmito alta je du metroj por kuiri bambuon. Laŭdire la antikvaj marmitoj estis trioble pli grandaj ol la hodiaŭaj. De lokanoj mi informiĝis pri la procedo de paperfarado el bambuo: Somere kaj aŭtune oni kolektas bambuojn de nur tri monatoj, trem

pas ilin en akvo por ses monatoj, tranĉas ilin en pecojn kaj kuiras ilin en marmito por duonmonato, poste oni batas ilin por ricevi bambuajn fibrojn, lavas ilin kaj pistas ilin en paston, fine elprenas la paston per bambua kribrilo por formi paperon...

Tiutage mi venis laŭ zigzaga vojeto en bambuaro en Macun-vilaĝon kun pli ol cent familioj, kiuj okupas sin pri paperfarado. Tiu, kiu loĝas ĉe la enirejo de la vilaĝo, estis prenanta paperon: li metis en ujon bambuan kribrilon en rektangula formo, malforte trempis ĝin en pasto, levis ĝin, balancis ĝin kaj en palpebruma daŭro aperis papero sur ĝi. Li diris al mi: "Oni faras paperon per balancado. Se oni ne bone balancos la kribrilon, la papero ne estos egale dika." Li stakigis malsekajn paperfoliojn kaj elpremis akvon per kriko. Vespere, li transportis ilin hejmen kaj disigis ilin unu de alia. En la sekvanta tago, lia edzino sekigis ilin po dek sur ligna tabulo aŭ sur muro. Se la suno brilas, 1-2 tagoj sufiĉas; se estas sinsekvaj nubaj tagoj, la paperfolioj ŝimas, kaj oni devas meti ilin al refarado. En la sezono sekigi paperfoliojn, ĉiuj familioj deziras bonan veteron.

Macun-aj viroj plejparte faras po 600-700 paperfoliojn tage kaj vendas po 100 mil unuaklasajn paperfoliojn jare. Ilia pokapa jara enspezo superas 15 mil juanojn. "Se vi laboros per maŝino, vi akiros pli multe." La paperfarantoj kapneis: "Se ni farus paperon per maŝino, ne plu estus heredita arto de la ĉinaj pentrado kaj kaligrafado, kiuj postulas bonan paperon, netralaseblan, sed elteneblan por inko, tio ebligas al pentristo laŭvole superregi la densecon kaj ricevi tavolojn de inko, ekz., la pentraĵo pri kokido kaj tiu pri lotusfloro, ĉiuj estas versimilaj. Lokanoj diris, ke ili povas fari tian paperon dank' al majstro Zhang Daqian. En la meza periodo de la 40-aj jaroj, Zhang Daqian loĝis en Chengdu. Siatempe li uzis nur Xuan-papero produk-

titan en Anhui. Poste, Xuan-papero elvendiĝis pro milito. Anstataŭ ĝi li ekuzis Jiajiang-papero, tamen li trovis, ke la lasta estas ne tiel eltenebla por inko kiel la antaŭa, tio malhelpis la pentradon. Li petis faman paperfaranton refari la ingrediencojn kaj speciale venis en Macun-vilaĝon por peti majstro-paperfariston Shi Ziqing provfari novan paperon. Du monatojn poste, naskiĝis la nova papero, kiu multe plaĉis al la pentristo. De tiam Jiajiang-papero portas alian nomon Daqian-papero. Por memori lin, la lokanoj pendigis super la pordo de la metiejo de Shi Ziqing grandan tabulon kun la vortoj "Daqian-paperfarejo".

Vintre en Macun-vilaĝo ankoraŭ prosperas antikvaj arboj kaj bambuoj. Ŝtonaj ŝtuparoj abundas

je musko. Sub la alero de la antikvaj domoj kun nigra tegmento estas blankaj papersekigaj tabuloj. La vilaĝo estas tiel kvietaj, ke aŭdiĝas nur kantado de birdoj kaj lirlado de akvo. Fakte, ĉiuj vilaĝanoj estas tre okupitaj. La silenta laborado estas vidata en paperfarejo. Tamen la tagoj, kiam oni pistas bambuajn fibrojn, estas bruoplenaj. La viroj tutkorpe ŝvitantaj pistas, kantante. Ili kantas pri ĉio, kio flugas en la ĉielo, pri ĉio, kio kuras sur la tero, pri ĉio, kio sidas en la koro, kaj pri ĉio, kio okazis en la familio aŭ en la lando. Ili diris, ke ju pli ili laciĝas, des pli ili kantas. Kiam ili kantas, ili pli energie laboras. La plej ĝojaj estas tiuj, kiuj sin okupas pri lavado de bambuaj fibroj. Ŝercante, ili lavas bambuajn fibrojn, kaj ilia gaja rido flugas foren...

Flegado de bambuaro





Trempado de bambuaj trunkoj en akvo

Pli foren flugas la paperfara arto de Macun. Laŭ invito la 61-jara Shi Fuli kvarfoje prezentis sian paperfaran teknikon en Usono. En Ĉikago iu pli-ol-30-jara kamparanino venis spekti ĉiutage. Ankaŭ ŝi funkciigas papermetiejon. Balancinte paperpaston per ŝtala reto, ŝi ne sukcesis fari paperfoliojn egale dikan. Ŝi miris, ke la maljuna ĉino disigas la paperfoliojn unu de alia post premado, per kriko, de po 500-600 malsekaj paperfolioj en dikeco de 30-40 cm, sed ŝi stakigis ilin po unu sur felta tapiŝo kaj dekoj da paperfolioj ja altis je pli ol 170 cm. Ŝi petis Shi fari demonstron en ŝia metiejo. Dum interparolo kun li ŝi informiĝis, ke li enmetis specialan sukron de folioj de arboj kreskantaj sur monto de Macun-vilaĝo, ĝuste pro tio la malsekaj paperfolioj stakigitaj ne adheris.

Kun lerteco en paperfarado, la tri filoj de Shi faris kulturajn interŝanĝojn en Usono, Britio, Svislando, Germanio kaj Belgio; nun

Kirlado de paperpasto



ili sin okupas pri komercado de papero. Menciinte sian edzinon, Shi diris, ke ŝi transportis sterkon sur monton, kie verdis malgranda legomĝardeno de la familio. Antaŭe oni kultivis grenplantojn sur la monto, sed neniom rikoltis. Poste, oni komprenis, ke estas pli bone planti bambuojn por fari paperon. Nun la riĉiĝintaj paperfarantoj aĉetas grenon, uzas elektron en kuirejo kaj kulturamas forston. La montoj reverdiĝis, sovaĝaj floroj kaj fruktoj altiris al si denove fazanojn, leporojn, ibeksojn... Aŭdiĝis de paperpistujoj lirlanta akvo. Shi diris: "Ni ne bezonas puton, ĉar el ŝtonaj fendoj sur montoj fluas akvo tutjare. Ĉiuj familioj de la vilaĝo kondukas montakvon al siaj metiejoj kaj kuirejoj per bambuaj tuboj." Sur rokoj laŭlonge de la ŝtonaj vojetoj zigzagas kanaloj kondukantaj al la hejmoj de la vilaĝanoj malproksimaj de la montoj. Laŭdire, ilin postlasis la prapatroj de Macun-anoj.



Sekigado de papero

Atenteme



Tradicia farado de papero

# Elekti vilaĝestron

Teksto kaj fotoj de GUO SHI

Matene okazas elektado en Liuji-vilaĝo. Hao Qunshan estas spertulo pri kultivado de kotonno. Kiel unu el la kandidatoj, li, en nova eŭropa kostumo, estas preta konkuri kun la nuna vilaĝestro Zhang Fushan. Kvankam mankas al li supereco, tamen li ne volas malesperigi tiujn

vilaĝanojn, kiuj subtenas lin.

Liuji-vilaĝo situas en Nanyang, Henan-provinco. Gvidate de Zhang Fushan kaj aliaj kadroj, pli ol 3 mil vilaĝanoj kultivis tritikon kaj kotonon kaj entreprenis flankokupon. Tiel ili ĉiuj altigis sian enspezon. Kiel unu el la kandidatoj, li estas memfida al sia sukceso.

Inter la kandidatoj estas ankaŭ

vilaĝanoj sin rekomendintaj.

Komenciĝas la elektado. Ĉiu kandidato donas paroladeton ekzemple pri altigo de enspezo de la vilaĝanoj kaj konstruado de vojo kaj fiŝlageto. Poste oni balotas. Rezulte, la 44-jara Zhang Fushan estas denove elektita.

Antaŭ la vilaĝanoj Zhang Fushan emocie diras: "Kredu min, mi ne malesperigos vin."

Al la balotado







Avino en la balotado



Kandidatoj



Propagando antaŭ la balotado



Oni balotas por la plej bonaj.



Ĉiu havas sian balotrajton.



Balotado sur la vilaĝa draŝejo

# Li semas esperon

de WANG YANBING, LUO DAQING kaj WANG XIANG-DONG

**Z**HANG Shengli fariĝis lernejestro!

Sinjoro Zhang estas ordinara junulo. Kial la informo, ke li fariĝis estro de malgranda elementa lernejo de sia hejmloko, vekis la atenton de multaj homoj? Ĉar li estis la unua knabo, kiun financis la "Espero-projekto" por lernado. Dum la pasintaj pli ol dek jaroj la nombro de lernantoj financitaj de la projekto jam atingis 2.09 milionojn kaj Zhang estas la unua, kiu revenis la hejmlokon post sia lernado.

Zhang loĝas en Hebei-provinco. En 1989 lia patro suferis gravan malsanon, kaj al li mankis mono por lernado. En tiu situacio li skribis al gubernia kadro Che Zhizhong, kiu iam vizitis la vilaĝon: "Mi volas viziti lernejon kaj fariĝi homo kiel vi, kiu servas al nia lando." Poste lia patro forpasis, li devis forlasi la lernejon, kaj pro tio li falis en malĝojon.

Novembre de 1989, la Ĉina Geknaba Disvolva Fonduso deklaris landskalan praktikadon de "Espero-projekto", kiu celas financi lernantojn, kiuj ne havas monon por daŭrigi sian lernadon. Kaj post enketo, 11 geknaboj, inkluzive Zhang Shengli, feliĉe fariĝis la unuaj financitoj. La 17-an de novembro 1989 Zhang ricevis de la fonduso "ateston pri financata lernado", kaj li revizitis la lernejon. De tiam ĝis lia diplomiĝo de normala kolegio, la projekto pagis por li la lernokotizon.

En 1995 Zhang eniris la Ŝanhajan Unuan Normalan Kolegion,



Zhang Shengli kaj liaj lernantoj

tiam liaj poentoj ne estis kontentigaj precipe en matematiko. Tamen li multe progresis post sia diligenta lernado kaj helpo de instruistoj kaj kunlernantoj. Li estis ankaŭ bonkondukta. En 1996, reprezentante ĉinajn junulojn, li veturis al Atlanta por partopreni la stafetadon de la torĉo de Olimpiaj Ludoj.

Diplomite en 1997, li memvole ekinstruis en la elementa lernejo de sia vilaĝo Taomugeda, kiu situas en profunda monto je pli ol 1 800 metroj super la mar-nivelo kun 9 familioj kaj pli ol 40 homoj. Ĉiujare ventegas pli ol 300 tagojn, kaj al la loĝantoj mankas akvo: en somero ili trinkas kolektitan pluvon, kaj en vintro ili portas glacieron de malproksima montpiedo. Tiam en la kaduka klasĉambro li gvidis la kurson kun nur 5 anoj. Poste restis nur 3 lernantoj, tamen li ankoraŭ serioze instruis. Por stimuli la lernantojn, li pendigis nacian flagon su-

per la nigra tabulo kaj dekstre de ĝi li skribis "iru ĉiam antaŭen" kaj maldekstre "lernu pli diligente".

Lia amatino esperis, ke li laboros ne en la lernejo, sed en regiono kun pli bonaj kondiĉoj. Tamen li amas la geknabojn, ĉar ili estas la espero de la malriĉa vilaĝo. Li ne volas, ke la geknaboj pro manko de instruisto forlasu sian lernejon.

Nun la lernejo jam havas novan klasĉambrojn kaj 13 lernantojn, kaj la alia instruisto helpas sinjoron Zhang, kiu fariĝis la unua estro de la lernejo.

Kiel lernejestro, li faras ĉion por la lernantoj: la geknaboj loĝas en la lernejo, li aĉetis per sia mono por ili aŭ skribilojn aŭ vivnecesaĵojn. Kvankam lacega de multaj laboroj, li diris: "Jam en la tago, kiam mi fariĝis la unua favorato de la 'Espero-projekto', mi decidis dediĉi ĉion mian al la socio, al mia hejmloko, por ke la geknaboj vidu la esperon." ■

# Donu al mi paron daflugiloj

## EDUKO — VOJO AL MEMSTARIĜO

Aŭtune de 1997 en Phillips-Universitato de Germanio la 29-jara ĉina handikapulo Han Fang, kiu ĵus

*Estus bone, se vi priskribos pri vivo de handikapuloj en Ĉinio, ĉar mi mem estas surdulo!*

ANTS PAAVO (Estonio)

de PING HUA

“**B**ELAS la mondo, sed mal-feliĉe, dum la dekelkaj jaroj post mia naskiĝo mi neniam tuŝis ĝin per miaj manoj, nek ĝian floron nek ĝian herbon nek ĝian ŝtonon. Mi ofte levis la kapon por rigardi aglon ŝvebantan sur la ĉielo, pensante, ĉu ĝi povus flugi ankoraŭ kun rompitaflugiloj?” Jen vortoj el taglibro de Li Zhihua, kiujn ŝi skribis per piedo.

La 15-jara Li Zhihua naskiĝis en Interna Mongolio de Ĉinio. En la aĝo de unu jaro, ŝi perdis siajn manojn pro incendio en la hejmo. Antaŭ du jaroj la Protezo-fabriko de Interna Mongolio senpage faris al ŝi manajn protezojn. Post tio ĉiufoje, kiam ŝi legis la supre menciitajn vortojn plenajn de melankolio, ŝi sentis sin ĝoja kaj trankvila: “Jes, mi ankoraŭ povas flugi, se nur mi havigas al mi denove la flugilojn.”

Nun en Ĉinio vivas pli ol 60 milionoj da handikapuloj kia Li Zhihua, vivantaj en 1/5 da ĉinaj familioj. La helpo liverita al ili markis la civilizacian nivelon de la socio. En la pasintaj dek jaroj Ĉinio akiris rimarkindajn sukcesojn en porhandikapulaj aferoj, pro tio la koncerna organizo de UN honoris la Ĉinan Federacion de Handikapuloj per titolo “Paca Sendito de UN”, kaj “Speciala Premio de Dek Jaroj de Aziaj kaj Pacifikaj Handikapuloj”, “Humanisma Premio de Paul Harris” kaj aliaj premioj.



En la Tutlanda Sportkunveno de Handikapuloj

akiris doktorecon de la spira interna medicino de la Pekina Medicina Universitato en la 5-a Monda Konferenco de Spira Malfacilo dum Dormado, kaj lia disertaĵo vekis grandan atenton de la ĉeestantoj.

Han Fang, kiu pasigis sian infanecon en kamparo kaj kripliĝis pro infana paralizo, havas nun sian propran laboratorion. Li ŝuldas sian hodiaŭan sukceson al progreso de edukado de handikapuloj de Ĉinio en la lastaj jaroj.

Klerigo al handikapuloj estas tre grava, por ke ili povu pli bone vivi kaj memstariĝi en la socio. Antaŭe la ĉina registaro kutime donacis al ili vestojn kaj aliajn vivbezonaĵojn en festaj tagoj, krom la monhelpo, sed tio ne povis radikale ŝanĝi la staton, ke ilia vivnivelo estas sub la averaĝa vivnivelo de la socio. Sed pere de edukado oni havigas al ili laboran kapablon kaj helpas al ili sin liberigi el la malriĉeco en la koncepto kaj klereco. Lastjare oni metis la partikularan edukon al handikapitaj geknaboj en la ĝeneralan projekton de popularigo de la deviga edukado de Ĉinio. Nuntempe ankaŭ ordinaraj lernejoj akceptas handikapitajn geknabojn. 669 profesiaj edukaj establaĵoj por adoltoj jam elkulturis 890 mil handikapulojn kaj tri apartaj edukaj institutoj jam akceptis kelkmil handikapulojn. En *Reguloj pri Edukado al Handikapuloj* publikigita de la Ŝtata Konsilantaro en 1994 legiĝas difinoj por handikapuloj pri propedeŭtiko, edukado deviga, profesia kaj alta kun la celo defendi iliajn rajtojn de klerigo.

## LEĜA SISTEMO, DEFENDO DE RAJTOJ

*Reguloj pri Edukado al Handikapuloj* kune kun *Leĝo por Protekti Handikapulojn*, *Leĝo pri Laborigo de Handikapuloj* kaj aliaj koncernaj leĝoj formis leĝan sistemon de Ĉinio por disvolvi aferon de handikapuloj kaj defendi iliajn leĝajn rajtojn.

En 1997 dekkelkaj junaj handikapuloj la kamparo en Shandong-provinco kolektiĝis, kun la broŝuro

*Leĝo por Protekti Handikapulojn*, antaŭ la sidejo de la loka registaro kaj postulis, ke la registaro plenumu la koncernajn difinitojn en la leĝo. La enketo montris, ke efektive oni malbone plenumis la laboron por handikapuloj. Post esploro la koncerna departemento ellaboris 12 detalajn regulojn pri klerigo, laborigo kaj kuracado de handikapuloj, krome oni nuligis aŭ reduktis la imposton por ili. Tio montris, ke plifortiĝas konscio de handikapuloj pri la leĝo kaj iliaj rajtoj. Ankaŭ la registaro, socio kaj publiko pli kaj pli konscie defendas iliajn interesojn.

Efektive, handikapuloj estas malfortaj en iuj kampoj kaj iliaj leĝaj rajtoj estas facile atencataj. Por solvi iliajn malfacilojn en procesado, naskiĝis leĝa help-centro por handikapuloj kaj aliaj malfortuloj en 200 ĉinaj gubernioj.

## AMO KAJ HELPO DE LA SOCIO

En 1988 fondiĝis la Ĉina Federacio de Handikapuloj. Dum tiuj dek jaroj evidente pliboniĝis la stato de ĉinaj handikapuloj: iagrade boniĝis la sanstato de 4.16 milionoj da handikapuloj, el kiuj 2.11 milionoj da kataraktuloj rehavis vidkapablon, 90 mil surdaj knaboj kapablas paroli, 600 mil malsanuloj de poliomyelito plibonigis sian funkcion de movado, post operacio, 870 mil gravaj mensaj malsanuloj normaliĝis post sinteza kuracado, 140 mil intelektaj debiluloj scipovas aranĝi sian propran aferon, dank' al resaniga trejnado. La procento de lernej-vizitantaj blindaj, surdaj kaj intelekte malfortaj geknaboj altiĝis de 6% antaŭ dek jaroj al 64.3%, tiu de laborantaj handikapuloj — de 5% al 73.3%. Blindaj masaĝistoj multiĝis de kvar mil al 20 mil. Ĉinaj handikapuloj gajnis entute pli ol 1.3 mil orajn medalojn en gravaj internaciaj sportaj kunvenoj.

Tio ne estas simplaj kaj enuigaj ciferoj, en ili kuŝas amo kaj helpo de la socio al handikapuloj kaj ilia propra penado. Sekve de la socia disvolviĝo oni donis pli kaj pli grandan



Sun Xiaomei, diplomito de la Ĉina Konservatorio, en koncerto

atenton al la laboro disvolvi latenton de handikapuloj kaj doni al ili sanĉon manifesti la valoron de ilia vivo. 1999 estas la naŭa jaro de la aktivado "La tuta lando helpu handikapulojn". La koncepto pri handikapuloj multe ŝanĝiĝis. Oni ne plu rigardas handikapulojn kiel sentaŭgajn. Nun ĉinoj respektas ne nur la rajton de handikapuloj, sed ankaŭ iliajn kapablojn.

Samtempe, kuraĝite de la spirito "memrespekta, memfida, memfortiga kaj memstara", pli kaj pli multaj handikapuloj eliris el la vico de helpatoj kaj eniris en tiun de helpantoj, eĉ ricevinte pli brilan sukceson ol normalaj homoj. Ekz., Shi Tiesheng, vicprezidanto de la Pekina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, unukrulinano Zhong Wenfang, kiu vojaĝis tra la mondo. Zhang Haidi, unika virino el la "Kvin elstaraj handikapuloj de la mondo" el la filmoserio komponita de la televida stacio NHK de Japanio, inspiras milojn da ĉinoj per sia heroa spirito kaj eksterordinara vivipovo. Menciindas, ke pasintjare pluraj ĉinaj ĵurnaloj aperigis la artikolon "Strangolu la gorĝon de la fatalo", kiu konigas rakontojn de Mao Zifu, kripla esperantisto-poeto.

La 16-an de oktobro 1998 la Ĉina Federacio de Handikapuloj okazigis sian Trian Tutlandan Kongreson kaj konigis la laborcelon kaj taskon de la tutlanda kaj diverslokaj federacioj de handikapuloj en la venontaj kvin jaroj por krei novan socion al handikapuloj. ■

# Maĝango en Ĉinio

de PING HUA

**L**ASTATEMPE ne nur ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj, sed ankaŭ ĉinaj ŝtatoficistoj tre ĝojis, ke maĝango estas enlistigita de la Ĉina Komisiono de Korpokulturo kaj Sportoj kiel sportobranĉon kaj ludreguloj pri maĝango estas proklamitaj.

## HISTORIO PRI MAĜANGO


Maĝango estas populara en Ĉinio. Enketo montras, ke 500 milionoj da ĉinoj scias ludi ĝin. Tial iuj fremdlandaj raportistoj diris, ke maĝango estas la unua sporto de ĉinoj.

“Masoni la Grandan Muron” estas aludo de maĝango. Ambaŭ estas kvintesenca de la ĉina kulturo. La bloketoj de maĝango similas al brikoj de la Granda Muro. Maĝangon ludas 4 personoj, kiuj prenas po 13 bloketojn. Kiu la unua bone aranĝas siajn bloketojn, tiu sukcesas. Forminte “kvadratan urbon” el bloketoj, oni ekludas. Tial maĝango nomiĝas ankaŭ ludo de “kvadrata urbo”.

Maĝango havas bloketseriojn “tubo, slipo kaj dekmilo” de la 1-a ĝis la 9-a, kun po 4 pecoj, sume 108 pecoj. La bloketoserioj oriento, sudo, okcidento, nordo, Zhong, Fa kaj Bai havas po 4 pecojn. Estas ankaŭ anstataŭaj bloketoj printempo, somero, aŭtuno, vintro, orkideo, bambuo, krizantemo kaj umefloro, kiuj ŝajnas senutilaj, tamen spegulas la lirikon de antikvaj ĉinaj kleruloj.

Maĝango fontis de Ming-dinastio (1368-1644). Estas interesa historio pri maĝango kiel jene.

Maĝango estas tradicie nomata pasera ludo. Tiel oni nomas nun ankoraŭ en Taiwan, Hongkong kaj Sudorienta Azio. Populara rakonto diras, ke en Ming-dinastio imperiestra familio konstruis grandan grenejon en suda Ĉinio. La grenejo allogis multe



Bloketoj de maĝango

da paseroj. Soldatoj, kiuj gardis la grenejon, amuzis sin per paserkapto. Ilia konduto estis laŭdita de la oficisto de la grenejo, kaj li donis al ili bambuajn slipojn kiel registron de ilia kaptofrukto. Poste la paserkapto fariĝis ludo. La ludmaniero kaj slango similas al tiuj de la paserkapto. La desegnoj de tubo, slipo kaj dekmilo simbolas respektive arkebuzon, ĉenon da paseroj kaj premion; 4 ventdirektoj signifas, ke la ventdirekto estas grava en pafado, Zhong signifas trafon, Bai — maltrafon, Fa — premion. Dum la ludo Peng signifas sonon de pafo, Hu — aglon. Kun aglo oni ne ĉagreniĝas pri maltrafo de pasero, do sukcesinto ĉiam diras Hu kiel gajnon de la ludo. Krome, aliaj terminoj kiel Chi kaj Gang similas al tiuj de paserkapto.

## KIE TROVIĜAS ĈINOJ, TIE ESTAS LUDANTOJ DE MAĜANGO

En la komenca periodo maĝango estis hazardludo kiel briĝo. Kaj en la antikveco kaj en la nuntempo, kaj en Ĉinio kaj en aliaj landoj oni vidis sennombrajn ekzemplojn pri hazardludoj.

Estas bedaŭrinde, ke maĝango, kiu ofte rilatas kun hazardludo, ne fariĝis oficiala sportobranĉo, dum briĝo, *vejĉi-o* kaj ĉina ŝako jam enviciĝis inter la sportobranĉoj. La registaro permesas ludon kaj malpermesas hazardludon, sed tio ne bone efikas. Ofte okazas ruiniĝo de familio, ŝtelo, rabo kaj aliaj malbonaj aferoj kaŭzitaj de maĝango. Tial maĝango havis malbonan reputacion. En la kampanjo por novaj moroj oni rigardis maĝangon io forpuŝenda.

Tamen en la pasintaj 20 jaroj maĝango refuroris pro malstreĉiĝo de la situacio kaj multiĝo de libertempo.

Maĝango estas interesa kaj akceptita de la popolo ankaŭ pro la longa historio kaj kulturo de Ĉinio. Ĝi influas la tutan konfuceanisman kulturkampon, ĉefe Orientan Azion. Laŭdire, la Japana Maĝanga Federacio havas pli ol 25 000 klubojn; kaj Koreio, Singapuro, Taiwan kaj aliaj landoj kaj regionoj fondis perfektajn maĝangajn organizojn. Kvankam ekzistas diversaj ludmanieroj, tamen la ludo plezurigas la orientajn popolojn. En Ĉinio, lulilo de maĝango, la popolo trovas pli grandan ĝuon

# Stelulino — nigra anaso

de AN XIU

**Ĉ**E lageto vivis amaso da kvakemaj anasoj. Inter ili troviĝis nigra anaso, malgranda, maldika kaj malbela. Sed ŝi ne konsciis sian malbelecon. Ĉe sunleviĝo ŝi ekkantis kaj ekzercis sin sur la bordo de la lageto. La aliaj anasoj opiniis ŝin stulta.

Matenon de iu printempa tago, venis reĝisoro, kiu volis elekti ĉefrolulinon el la anasoj. La nigra anaso kaj la aliaj etendis sian kolon, por ke la reĝisoro bone vidu ilin. Fine la reĝisoro elektis kaj forkondukis belan blankan anason. La neelektitaj anasoj mokis la nigran, ke ŝi ne fariĝos aktorino pro

sia malbeleco.

Rigardinte sin en la lago, la nigra anaso ekkonsciis sian malbelecon. Ŝi malĝojis, sed post iom da tempo forgesis tion. Ŝi pensis, ke se nur ĝojo akompanas ŝin, la malbeleco ne malhelpas ŝian naĝon kaj salikokokapton. Kiel antaŭe ŝi naĝis en la lago.

Tagmezon de iu somera tago, venis instruisto de vestomontra teamo, kiu volis elekti manekanon. La nigra anaso kiel la aliaj elstarigis sian bruston, iris kaj reiris antaŭ la instruisto. Fine la instruisto elektis flavan anason kun bela vizaĝo. Kaj la neelektitaj anasoj mokis la nigran, ke ŝi ne taŭgas por vestomontrado.

La nigra anaso rerigardadis sin

en la lageto: “Ha! Kiel malbela mi estas!” ŝi malĝojis, sed post iom da tempo forgesis tion. En la lageto ŝi amuzis sin kiel antaŭe.

Posttagmezon de iu aŭtuna tago, venis trejnisto de sporta teamo, kiu volis elekti la plej elstaran el ili. Laŭ ordono de la trejnisto ĉiuj saltis 100 fojojn, kuris 3 fojojn ĉirkaŭ la lago kaj naĝis surdorse ire-reire. La anasoj ege laciĝis kaj multaj el ili grumblis: “Krom nia lageto ni volas neniun alian lokon.” Fine nur la nigra plenumis la taskon.

Ŝi spiregante surbordiĝis kaj diris al la trejnisto: “Mi kapablas ankaŭ subakviĝi, turniĝi kaj stari kun kapo malsupren en la akvo.” La aliaj anasoj mokis: “Ŝi certe opinias, ke cirka trupo volas akrobaton.”

La prezentado de la nigra anaso ĝojigis la trejniston, kaj li elektis ŝin kiel ĉefan membron de la art-naĝa teamo pro ŝiaj bela staturo, fortikaj membroj, brila plumaro kaj gaja esprimo.

La aliaj anasoj surpriziĝis pro ŝia elstara prezentado.

La nigra anaso estis forkonduki-ta. Poste ŝi fariĝis elstara sportistino. Ŝi partoprenis multajn konkursojn, akiris multajn orajn medalojn kaj fariĝis sporta stelulino.

Kiam oni menciis la nigran anason, ĉiuj aliaj anasoj ĉe la lageto fiere diris: “Ŝi estas nia plej bona amikino, antaŭe ni kune ludis.” ■



en la ludo. Ne estas troigo diri, ke “kie troviĝas ĉinoj, tie estas ludantoj de maĝango”. En maĝango oni povas koni la temperamenton de ĉinoj.

## IRI AL ĜUSTA VOJO

Maĝango fontis de Ĉinio kaj neeviteble furoras en Ĉinio, sed

mankis vojo kondukanta ĝin al sana disvolviĝo. Longtempe maĝango ofte ligiĝis kun hazardludo. Laŭ publika opinio oni devas enlistigi maĝangon kiel sportobranĉon por konduki ĝin de familio al la socio kaj levi ĝin de vulgareco al eleganteco. La ludreguloj pri maĝango celas ĉefe disvolvi intelekton, sed ne loterion. La tradi-

cia ludo estas iranta laŭ sana kaj civilizita vojo. Fine de 1998 okazis en Kantono la Unua Sana Maĝangkonkurso sankciita de la Ĉina Komisiono de Korpokulturo kaj Sporto. Ĝin partoprenis 64 teamoj.

Maĝango iras al ĝusta vojo. Oni atendas okaziĝon de la Unua Ĉina Maĝangkonkurso. ■

## USONANOJ RIGARDI BALOTADON POR REPRESENTANTOJ ĈINAJ DISTRIKTAJ POPOLAJ KONGRESOJ

Invitite de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, usona vizitgrupo el balotaj fakuloj



Membro de la vizitgrupo (la dua de maldekstre) interparolanta kun balotantoj

kaj ĵurnalistoj de la usona Cartercentro faris 10-tagan viziton por rigardi balotadon por reprezentantoj de ĉinaj distriktaj popolaj kongresoj. Iuj el la vizitgrupo timis, ke la ĉina registaro prezentos al ili nur modelajn vilaĝojn, kiuj ne povas speguli la ĝeneralan staton de Ĉinio.

Ĉinio rekomendis al la usonanoj vilaĝon de Chongqing por ilia vizito, sed la vizitgrupo diris, ke iuj el la grupo povas laŭ la plano viziti la vilaĝon, dum la aliaj volas viziti la vilaĝon Banqiao je dekoj da km for de tiu vilaĝo, kaj la ĉina instanco tuj konsentis tion.

Elekti reprezentantojn de la distriktaj popolaj kongresoj estas baza laboro por la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Reprezentantoj de la distriktaj popolaj kongresoj estas elektitaj de ĉiuj vilaĝoj, distriktaj establoj kaj entreprenoj. La balotado en Banqiao-vilaĝo komenciĝis je la 10-a antaŭtagmeze. La 4 kandidatoj estis vilaĝestro, kasisto, prezidantino de la virina

komitato kaj estro de la vilaĝa elementa lernejo. La balotantoj devis elekti 3 el ili. Por gajni konfidon de la balotantoj, la kandidatoj surpodiigis unu post alia por fari paroladon por la elektado. Post tio oni faris balotadon, kiu finiĝis je la 12-a. Fine estis elektitaj la vilaĝestro, kasisto kaj prezidantino de la virina komitato.

U s o n a doktoro, kiu rigardis la balotadon, diris: "La balotado en Banqiao estis farita sen postkulisa manpulado. Tamen dum la balotado iuj metis la balotilon sur sian genuon kaj faris markon tie kaj aliaj murmuris inter si kaj metis la balotilon en

urnon kolektive. Ĉio ĉi ne konformas al la principo de demokratia elektado pri sekreta balotado." Ĉina akompananto diris, ke laŭ la ĉina leĝo oni ne postulis nepran instalon de sekreta balotejo en la demokratia elektado. Koncerne tion, ke oni faris markon sur sia genuo, li eksplikis, ke tio estis kaŭzita de la objektivaj cirkonstancoj. Ankaŭ en aliaj malriĉaj vilaĝoj estas similaj okazaĵoj, nekonformaj al la demokratiaj reguloj, tamen tiaj fenomenoj ne ekzistas en la ĉemaraj lokoj kaj la lokoj kun kompare evoluantaj kulturo kaj ekonomio.

Rigardinte balotadon en pluraj vilaĝoj de antaŭurbo de Chongqing, la estro de la vizitgrupo diris: "Multaj havas miskomprenon pri la balotado en Ĉinio, opiniante, ke ĝi estas lando fermita kaj ĝia popolo katenita ideologie, sed mi mem spertis, ke ĝi estas lando malfermita. La ordinaraĵoj aktive partoprenas ŝtatajn aferojn, kio profunde impresis min. Tio helpas nin multe koni la demokratian sis-

temon de Ĉinio. Usono kaj Ĉinio devas daŭrigi interŝanĝon kaj kunlaboron en tiuj flankoj."

## PRAPATROJ DE BIRDOJ ĈINAJ SAŬROBIRDOJ

En la internacia simpozio pri la origino kaj fruperioda evoluo de la birdoj, kiu finiĝis en Yale-Universitato de Usono, pli ol 500 ornitologoj venis al la komuna konkludo, ke la ĉinaj saŭrobirdoj estas prapatroj de la birdoj de la tuta mondo kaj oni devas retiri la antaŭan opinion, ke la germanaj arkeopterigoj estas prapatroj de la birdoj, kaj devas fari tiun ŝanĝon en ĉiuj lernolibroj.

D-ro Ji Qiang, direktoro de la Ĉina Geologia Muzeo, malkovris en la okcidenta regiono de Liaoning-provinco, Ĉinio, 4 rarajn fo-



siliojn de junaj kaj plenkreskaj ĉinaj saŭrobirdoj kaj eksponis ilin en Yale-Universitato, kio faris sensation. Oni mendis la specimenojn por eksponado jam ĝis 2002.

S-ro Ji Qiang konigis, ke la 0.56-metre longaj junaj saŭrobirdoj kun akraj dentoj estis kovritaj de plumoj 0.7 cm longaj. Ilia vosto



konsistas el pli ol 50 vertebroj. Ili-aj antaŭaj kaj postaj membroj jam disiĝis. Ili, evoluantaj de bestopiedaj saŭroj al la arkeopterigoj, estas prapatroj de la birdoj. La plenkreskaj ĉinaj saŭrobirdoj longis 1.06 m kun flokaj plumoj 2.3 cm longaj. Iliaj dentoj estis akraj kaj vosto- toj longaj, el pli ol 50 vertebroj. El ĉi tiuj klare vidiĝas, ke ili estis evoluantaj al flugiloj.

Post la esplorado oni konstatis, ke la ĉinaj saŭrobirdoj vivis je 2-3 milionoj da jaroj pli frue ol la germanaj arkeopterigoj.

Fakuloj de la Instituto de Vertebrula Paleontologio kaj Paleantropologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj diris, ke kvankam Ĉinio akiris grandajn sukcesojn en esploro pri fruperiodaj birdoj, tamen la veraj prapa-

geologoj ĉiujare grimpas sur la Qinghai-Tibetan Altebenaĵon por "sekci" ĝin kaj koni profundan sekcon de la altebenaĵo kaj tiun de Himalajo. Ili faris tiun laboron ekde la suda regiono kaj ilia "sekcado" jam atingis la mezan parton de Tibeto.

Montrante la fotojn faritajn dum la "sekcado" de la altebenaĵo, ĉina sciencisto Zhao Wenjin diris: "Tio estas materialoj akiritaj per 100 tunoj da dinamito kaj 2 000 eksplodigoj."

Dum la ĉi-foja "sekcado" la ĉinaj kaj alilandaj geologoj malkovris zonon de sismo-reflektado 150 km longan. La sekco montras, ke la hinda bloko sin puŝas forte al la norda Qinghai-Tibeta Altebenaĵo laŭ tiu sekco parte aŭ tute, kio kaŭzas senĉesan leviĝon de la

kontinento. Tio helpas koni la geologian kaŭzon de la tertremoj kaj malkovri subterajn minaĵojn.

## ASTRONOMOJ CEDAS SOCIAJ KUTIMOJ


Ĉu la 21-a jc kaj nova jarmilo komenciĝos en 2000 aŭ 2001? Ĉefaj observatorioj de la mondo kaj multaj astronomoj opinias, ke tio estas simpla kaj klara samkiel  $1+1=2$ . Kompreneble, la komenco de la nova jarcento kaj nova jarmilo devas komenciĝi en nul horo de la 1-a de januaro 2001. La observatorio Zijinshan sub la Ĉina Akademio de Sciencoj antaŭ nelonge prezentis la saman opinion.

Tamen ordinaraj popolanoj opinias, ke la jaro 2000 estas komenco de la nova jarcento kaj nova jarmilo. Multaj urboj jam de

longe preparas grandiozan solenadon, por ke en la fino de 1999 okazu ceremonio por la nova jarcento kaj nova jarmilo. En Britio Londono aktive preparas aktivadon por bonvenigi la novan jarcenton, kiu laŭ ili komenciĝos en 2000. Por akcepti turistojn, oni konstruas tie 55 hotelojn. Ejfel-turo en Parizo havas tabulon 12 m altan kaj 33 m longan en la norda flanko de sia 2-a etaĝo. Sur la tabulo legiĝas la vortoj "inverse kalkula elektronika ekrano por 2000".

Efektive ankaŭ la ordinaraj popolanoj ne estas analfabetaj pri almanako nek intence kontraŭstaras al astronomoj,

sed ili multe inklinas al la kutimoj. Ili diris, ke la homoj kutime prenas la rondan nombron 2000 kiel la unuan jaron de nova jarmilo, ĉar oni aplikas decimalan nombrosistemon kaj ĉi-flanke multaj astronomoj en la mondo prenis kvietan sintenon kaj decidis cedi al la sociaj kutimoj.



Fosilio de ĉina saŭrobirdo

troj de birdoj devas esti serĉataj en pli antikvaj stratumoj, kaj en tiu flanko la okcidenta regiono de Liaoning-provinco estas la plej bona loko por solvi tiun problemon.

## "SEKCI" LA QINGHAI-TIBETAN ALTEBENAĴON

Ekde 1991 ĉinaj kaj alilandaj

altebenaĵo kaj puŝas ĝin norden ĉiujare je 5 cm. La usona revuo "Sciencoj" nomas tiun procedon "movi montojn".

Zhao Wenjin diris, ke en la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo plurfoje okazis tertremoj de 6-8 gradoj, kies ĉefa kaŭzo estas la giganta sinpuŝo de la hinda kontinento al la ĉina



# Piedira vizitgrupo

Teksto kaj fotoj de ZHAO XI

Iumatene de la printempo de 1999 en la Someran Palacon de Pekino venis grupo de Piedira Kongreso de Miyagi-gubernio de Japanio por viziti Ĉinion. Ili piediris 8 kilometrojn en la Somera Palaco.

Tio estis la tria tia aktivado organizita de la kongreso. La unua estis en Usono kaj la dua en Kanado, kun po preskaŭ 200 partoprenantoj kaj la tria kun 350 homoj, kies averaĝa aĝo estis 64 jaroj.

La celo de la aktivado estas ne nur sanigi la maljunulojn kaj kontaktigi ilin kun pekinanoj, sed ankaŭ helpi ilin koni Ĉinion kaj amikigi ilin kun ĉinoj.



"Ĉu ĝi ridas kiel mi?"



Dum paŭzo



Ekiro



Postirantoj



Brakumo povas mildigi lacon.



Fotado sub floranta persikarbo



Matena flegado



Ŝi helpas al la patro ellitiĝi.

Ano inter la patro kaj la filino

Teksto kaj fotoj de WU ZHENGZHONG

Inter la kunlernantoj kaj vilaĝanoj cirkulas la kortuŝa rakonto, ke en ses jaroj Wang Ping, lernantino de elementa lernejo, bone flegas sian paralizitan patron.

En 1990 pro kolizio kun traktoro vundiĝis ŝia patro. Post la paraliĝo de la patro, la patrino forlasis la familion. Do la filino prenis sur sin la devon flegi la patron. Ĉiumatene ŝi helpas la patron ellitiĝi, vestas lin, lavas al li la vizaĝon kaj preparas por li matenmanĝon kaj tagmanĝon. Fininte tion, ŝi rapidas al la lernejo kun manĝaĵo en la mano. Reveninte hejmen, ŝi okupiĝas pri mastrumado, ĝenerale post la 9-a ŝi sin turnas al sia hejmtasko. En ferioj ŝi devas labori en la legomĝardeno. La patro domaĝas sian filinon kaj kun larmoj petas ŝin, ke ŝi ne plu flegu lin. Ŝi, rimarkinte lian malesperon pri la vivo, konsolas lin kaj pli bone prizorgas lin.

La rakonto de Wang Ping kortuŝis la vilaĝanojn, lernantojn kaj instruistojn. Ili volonte helpas la patron kaj filinon diversmaniere, ankaŭ la bonstatiga institucio helpas ilin en la vivo. Dank' al tio ilia vivo boniĝas, kaj Wang Ping havas pli da tempo por lernado.


# La patro k



Promenado



"Jen, mia plia honoro-atesto el la lernejoj"



Preparado de mango

# aj la filino

# Historieto de humura dialogo

de YANG ZHEN

**A**NTAŬ nelonge ni aperigis artikolon pri kanada junulo Mark Rowswell, kiu lernis humuran dialogon ĉe ĉina aktoro kaj poste mem fariĝis elstara aktoro de tiu ĉi arto. Humura dialogo, originala arto de Ĉinio, estas multe ŝatata de ĉinoj. En multaj amuzaj kunvenoj kaj novjara amuza vespero humura dialogo estas nemankigebla programero.

En Ĉinio la humura dialogo havas historion de pli ol 2 000 jaroj.

## SERIOZECO ENKORPIGITA EN FARSO

*Pajjoŭ* estis nomo de farsistoj en antikva Ĉinio. Ili, spritaj kiel klaŭnoj en la dramoj de Ŝekspiro, estis multe pli fruaj ol ili. Ili estis komediistoj kaj ilia prezentado entenis la karakteron de humura dialogo kaj ankaŭ tiun de dramo.

Frue antaŭ 2 300 jaroj *Pajjoŭ* jam aperis en kortego de antikva Ĉinio. Tio okazis en Chu-regno. Tiam en la kortego estis *Pajjoŭ* nomata You Meng. Mortis ĉevalo ŝatata de la regnestro kaj tiu intencis solene funebri la ĉevalon kiel aristokrato. Li rifuzis ĉies admonon kaj ordonis ekzekuti tiun, kiu kuraĝos ankoraŭ deadmoni lin. You Meng venis kaj ploregis enpaŝante tuj en la palacon. En miro lin demandis la regnestro kaj tiu respondis: "Ne sufiĉe solena estos la ceremonio por aristokrato, bonvolu funebri vian ŝatatan ĉevalon kiel regnestron. Funebru ne sole niaj korteganoj, ankaŭ niaj najbaraj regnoj sendu komisiitojn por la funebrado." La regnestro sentis tion aroganta, sed You Meng diris: "Sed nur tiele oni povos scii, ke via moŝto ŝatas ĉevalojn multe pli ol hom-

ojn!" La regnestro komprenis lian sarkasmon kaj dividis la viandon de la ĉevalo inter la korteganoj. La ironio de You Meng ja aplikis la metodon de humura dialogo kaj konvinkis la regnestron per klaŭna bombasto.

Alia elstara farsisto estis You Zhan, favorata kortegano de Qin-dinastio antaŭ 2 000 jaroj. Imperiestro la Dua de Qin-imperio volis laki la urbomurojn de sia ĉefurbo Xianyang. You Zhan aplaudis: "Bonege! Kvankam laki la murojn multe elspezigos kaj peze ŝarĝos la popolon, tamen la lakitaj muroj estos glitigaj, kio malhelpos al la malamikoj surgrimpi laŭ la muroj." Kaj li daŭrigis: "Ne estos malfacile havi tiom da lako, sed lako devas sekigi en ombro, do estos malfacile konstrui grandan domon, kiu povos ombri la urbon." Tio ridigis la imperiestron kaj li forlasis la decidon.

## IRONIO KAJ MOKADO EN FRUA TEMPO

En la 7-a jarcento en Tang-dinastio furoris *Canĝjun*-dramo, vario de burleska prezentado de *Pajjoŭ*. *Canĝjun* estis oficiro en armeo, simila al la nuna altranga staba oficiro. En la 4-a jarcento en la regno de Posta Zhao estis *Canĝjun*. Li alproprigis ŝtatan silkaĵon kaj pro tio estis enkarcerigita. Dramistoj surscenigis lian faron por ironii. De tiam farso nepre devis havi *Canĝjun* kaj ĉifonulon kiel ĉefrolojn. En farso la ĉifonulo ironiis kaj batis *Canĝjun*, tial oni nomis ĝin *Canĝjun*-dramo.

*Canĝjun*-dramo havas gravan lokon en la historio de la ĉina antikva dramo kaj estis ankaŭ grava ĉenero en la historio de humura dialogo. Nun humuran dialogon oni

ludas unuope, duope, trioĉe aŭ eĉ pli multope, sed ofte duope. *Canĝjun*-dramo ludata de du personoj estis simila al la nuna humura dialogo.

## SIMILA SONIMITADO


Ludo de humura dialogo bezonas kvar kapablojn, nome parolo, imito, instigo kaj kanto. En Song-dinastio (960-1279) perfektigis humura dialogo. Ĝi havis ĵargonon: "Parolo kiel la ĉefa, instigo kiel la unua." Tio montras, ke humura dialogo estis komedia lingva prezentado.

En Song-dinastio artistoj aktivadis ne nur en la kortego, sed ankaŭ inter la popolo. Estis artisto Zhang Shanren, talenta en "rakonto de komikaĵo". Li estis saĝa en farado de "tri kaj duona versoj". La lasta duona verso estis duideograma kaj plej signifa.

Liaj versaĵoj ne herediĝis, sed rakonto pri alies "tri kaj duona versoj" eble estas utila por koni la humurecon de Zhang Shanren. Rakonto en antikva libro notis: Iu mokis per 17-ideograma poemo la prefekton, kiu faris riton por peti pluvon. La prefekto ordonis puni lin per 18 bastonbatoj. La prefekto dubis pri lia talento en versfarado kaj diris: "Se vi povos tuj verki alian 17-ideograman poemon, mi indulgos vin; se ne, mi pli severe punos vin." La homo senhaste verkis 17-ideograman poemon: "17-ideograman poemon mi faris, 18 batojn mi ricevis. Se pli longan poemon mi verkos, mortbato min favoros."

La prefekto nenion povis fari krom liberigi lin, malgraŭ ke tiu refoje mokis lin per poemo.

En la 12-a jarcento de la Suda Song-dinastio (1127-1279) estis folkloristo Niu Yuanzi. Li estis tre



S-ro Hou Baolin (maldekstre) prezentanta humuran dialogon

lerta en imitado de diversaj sonoj. Poste oni nomis *Niuyuanzi* tiun arton mem kaj eĉ tiajn folkloristojn, kiuj faradis prezentadon de imitado. *Niuyuanzi*-oj imitis naturajn sonojn, ofertajn kriojn de kolportistoj kaj dialektojn, aŭ imitis movojn kaj pozojn. Folkloristoj de Song-dinastio ne nur paradis per sia talento, sed ankaŭ allogis rigardantojn per reaperigo de la reala vivo kun enmiksitaj burleskaĵoj. Tial oni supozis, ke imito, unu el la kvar kapabloj de la humura dialogo, devenis de burleska imitado. En Ming- kaj Qing-dinastioj (respektive 1368-1644, 1644-1911) pli kaj pli perfektigis

la titolo, enhavo kaj formo de tiu gajiga arto.

## POPULARA ARTO EN DELIKATA LOKO

Antaŭ 100 jaroj en la rondo de humura dialogo estis influa persono Zhu. Antaŭe li estis klaŭno en pekina opero, poste sin turnis al ludo de humura dialogo. Tiam oni prezentis humuran dialogon nur subĉiele. Folkloristo Zhu faris cirklon sur placo kaj skribis sian nomon ŝutante blankan sablon por altiri al si spektantojn. Frapante bambuajn tabuletojn, li kantis pecon el loka opero kaj poste komencis humuran dialogon. Li estis honesta kaj nobla

artisto. En dekoj da jaroj li adaptis multajn popolajn rakontojn al humura dialogo, senĉese ĉerpis materialojn el la reala vivo por riĉigi la enhavojn de prezentado, kaj per tio li senkompte ironiis la malnoblajn sociajn morojn kaj mallumajn flankojn de la socio.

Kantado en moderna humura dialogo montriĝis ĉefe per imitado de lokaj operoj kaj arioj, kaj lastatempe oni eĉ kantis popmuzikon kaj ludis gitaron. Ankaŭ kantado estas unu el la minimumaj kapabloj de aktoroj. Kantado kaj imitado estas aldono de parolo kaj instigo, por fortigi komedian belecon de humura dialogo. Ni ekzemplu per tradicia verko de humura dialogo "Ŝanĝi profesion". La verko ironiis la absurdan okazaĵon en la komenco de la kuranta jarcento. Tiam Ĉinio estis en ŝtata funebro kaj ĉia amuzo estis malpermesata, do la artistoj devis ŝanĝi sian profesion. S-ro Hou Baolin, majstro de humura dialogo, sukcese imitis la kantadon de pluraj famaj aktoroj de pekina opero, kaj adaptis la tekston de ilia kantado al oferta krio de kolportistoj. Per mispozicio de artistoj kaj embaraso, la verko ironiis la diktatorecon de la feŭda socio kaj vekis eksplodan ridegon de la aŭskultantoj.

Oni ne bezonas malkonfesi, ke vulgaraĵoj kaj frazoj ofte aperis en la ludoj de humura dialogo en la frua periodo de moderna etapo. Poste dekadenciĝis la kortego de Qing-dinastio, kaj kleraj postuloj de la kadukaj nobelaj familioj sin vicigis en la verkantojn de humura dialogo, kreis multe da delikataj verkoj kun profunda penso, kio multe ŝanĝis la fizionomion de humura dialogo. En la lastaj jardekoj, kun Hou Baolin kiel reprezentanto, generacio da artistoj levis humuran dialogon al nova kulmino kaj kondukis ĝin en la solenan artan halon de la ĉina nacio. En la lastaj jaroj artistoj de humura dialogo vizitis Japanion kaj Singapuron, por ke fremdlandaj amikoj ridegu pro la gajiga arto de Ĉinio. ■

# Maizkulturado en suda Ĉinio



S-ro Han esploranta en eksperimenta maizkampo

de CAO CHUAN

**S**HILICUN, ordinara vilaĝo en antaŭurbo de Zhangzhou de Fujian-provinco, sudorienta Ĉinio, kulturata ĉefe rizon. Tamen en 1998 maizo abunde kreskis sur kampoj de tiu vilaĝo.

La kaŭzo estas tio, ke maizo, unu el la ĉefaj grenoj en Ĉinio, estas uzata plejparte en manĝaĵ-prilaborado kaj fiŝo- kaj bruto-bredado (ĝi konsistigas 70% de la nutraĵo de fiŝoj kaj brutoj). Nun la totala areo de maizkampoj estas 20 milionoj da hektaroj plejparte en mezvarma zono, t.e. nordoriento kaj nordokcidento de Ĉinio, kaj la meza hektara produktokvanto estas 7 500 kilogramoj. Por suda Ĉinio en subtropika zono ne taŭgas maizsemoj de norda Ĉinio, kaj tie la meza hektara produktokvanto de maizo

estas nur 3 000 ĝis 6 000 kilogramoj. Sed oni bredas fiŝojn kaj brutojn ĉefe en suda Ĉinio, tio kaŭzas strukturan mankon de grenoj, t.e. rizo mankas en norda Ĉinio kaj maizo en la suda.

Ĉiujare granda kvanto da maizo transportiĝis de norda Ĉinio al la suda, tio altigis la kostojn de prilaborado, fiŝo- kaj bruto-bredado kaj pezis la ŝarĝon de trafiko.

En 1998 d-ro Han Gengchang kaj aliaj establis la Teknik-disvolvan Limigitan Kompanion Origin, kiu kulturata maizvarion taŭgan por subtropika zono. Shilicun-vilaĝo estas unu el la kvar eksperimentejoj de la kompanio por kultivi, esplori kaj disvastigi novan maizvarion.

S-ro Han estas juna fakulo pri maizkulturo, kiu revenis post studado en Usono. Gvidate de li, la kom-

panio enkondukis 1 000 tropikajn maizspecimenojn ĉefe de internacia maiz- kaj tritik-pliboniga centro. Kelkcent specimenoj elektiĝis kaj kombiniĝis, kaj provkulturado de iuj el ili sukcesis en Shilicun kaj aliaj eksperimentejoj. La novaj semoj diferencas de tiuj en norda Ĉinio kaj havas fortan rezistecon kontraŭ malsano, insektoj, falo de tigoj kaj malfekundeco de tero.

Internaciaj semo-kompanioj kutime entreprenas selektadon, disvastigon kaj vendon de

semoj en unueco. Sed en Ĉinio scienc-esploraj institutoj zorgas nur pri selektado de semoj kaj semo-kompanioj nur pri semo-komercado. Sub tiu sistemo la scienc-esploraj institutoj dependantaj de ŝtata subvencio ofte ĉagreniĝas pro manko de monrimedoj por la esplorado kaj iuj semo-kompanioj foje vendas falsajn kaj malbonkvalitajn semojn por gajni pli multe da mono.

Tuj post sia fondiĝo la kompanio Origin faras sian entreprenadon laŭ la internacia sistemo: kredite ricevi monon ĉe banko kaj fari investon, kulturi kaj vendi semojn per si mem. La agado estas laŭdata de multaj provincoj kaj regionoj en suda Ĉinio.

Kvankam la kompanio komencis kulturi semojn antaŭ nelonge, tamen ĝi donas esperon al la maizkulturado en suda Ĉinio. ■



# Esperanto-aranĝoj

(de septembro ĝis decembro 1999)

*Laŭ "Plena Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj" de la redakcio de Eventoj, ni enlistigas alian parton de tiuj aktivadoj kiel jene.*

La Red.

## 03-05. septembro

50-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Vraca. Inf: BEA, p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario. Rete: <sukceso@yahoo.com> kaj <esperanto-vraca@yahoo.com>

## 04-10. septembro

7-a Internacia Turisma Semajno, Valletta. Inf: Malta Esperanto-Societo, P.O. Box 142, Valletta CMR-01, Malto. Tel: +356-486260, fakso: 356-523071. Rete: <maltaesp@global.net.mt>

## 05-12. septembro

Postkongresa (BEA) Ĉemara Feriado, Burgas. Inf: Esperinform, p/a B. Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario.

## 10-17. septembro

Vizitado de rumanaj monakejoj kaj delto de Danubo, Brasov-Suceava-Danubodelto. Inf: Rumana Esperantista Fervojista Asocio, str. Politehnicii 1, RO-2200 Brasov, Rumanio. Fakso: +40-68-151579

## 24-26. septembro

15-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto "ARKONES-99", Poznan. Inf: Zbigniew Kornicki, Osiedle Bolesława Smialego 7/22, PL-60-682 Poznan, Pollando.

## 25-29. septembro

25-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo, Bydgoszcz. Inf: Monda Turismo, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso: +48-52-3415744 aŭ 3460082. Rete: <andreo@rubikon.net.pl>

## 26-29. oktobro

3-a Internacia Studenta Esperanto-Kongreso de Azi-Pacifikaj landoj, Vladivostok. Inf: Aleksander

B. Titajev. Rete: <espero@pub.marine.su>

## 06-07. novembro

10-a Kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio, Kijiv. Inf: Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv, Ukrainio. Tel: +38-44-295701, fakso: +38-44-2952870. Rete: <inp@un.kiev.ua>

## 13-15. novembro

10-a Sudbrazila Esperanto-Renkontiĝo, Florianopolis. Inf: Esperanto-Asocio de Santa Catarina, Brazilo.

## 03-05. decembro

Antaŭkristnaska renkontiĝo, Bratislava. Inf: Mgr. Alica Komloši, Rovnikova 6, SK-82102 Bratislava, Slovakio. Tel: +421-7-291604

## 23.dec. 1999 -03. jan. 2000

Novjara Feriado "Karlova Vintro '99", Karlovo. Inf: Esperinform, p/a B. Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario.

## 29.dec. 1999 -02. jan. 2000

Budapeŝta Silvestro. Inf: Vojaĝoficejo Espertur, Tatra u. 4, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel: +36-1-2680306, fakso: +36-1-2680331. Rete: <esperantohea@mail.c3.hu>

## 30.dec. 1999 -02. jan. 2000

Silvestra balo kaj vintraj ekskursoj, Poprad. Inf: Esperanto-Regiona Societo, Sobotske nam. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio. Tel/fakso: +421-92-32419

## 31.dec. 1999 -01. jan. 2000

Novjarfesto en Karpatoj. Inf: Jaroslav Zaharija, B. Hmelnickogo str. 82/4-8, UA-284006 Ivano-Frankivsk, Ukrainio. Tel: +38-3422-62241

# Kiun rolon ludas teo en sanprotekto?

de BAO JIAN

**A**NTIKVA libro notis, ke foje por kuracado de malsanuloj, Shennong gustumis drogherbojn kaj svenis sub tearbo pro toksigo. Akvo venis en lian buŝon de sur tefolioj, kaj dank' al tio li estis savita. Jen la homoj trovis la sentoksigan funkcion de teo.

En la medicina libro "Nove reviziita Bencao" verkita en Tang-dinastio (618-907) legiĝas: "Teo estas dolĉeta kaj maldolĉeta, iom malvarmiga, tute senvenena. Ĝi estas efika por kuraci fistulon kaj ulceron, utila al urinado, digestado kaj mildigo de mukaĵo, sensoifigo kaj sendormigo. Ĝenerale, oni plukas tefoliojn en printempo."

Moderna medicino montras, ke teo enhavas multajn elementojn, kiaj kafeino, teino, kokaino, fenolo, vitamino C, kalcio, fosforo, fero kaj aliaj mineralaj elementoj.

La ĉinoj tre ŝatas teon kaj multaj el ili trinkas ĝin ĉiutage. Laŭ sia sanstato oni trinkas en malsamaj manieroj teon de malsamaj specoj.

La plej bona teo estas infuzita per fontakvo de 70-80°C, ĉar vitamino C entenata en teo povas esti detruita en akvo de pli ol 70°C, kaj plie, tanino kaj kafeino entenataj en teo estas tre facile solveblaj en akvo de 70°C.

Estas bone, ke oni trinkas teon nove infuzitan kaj ne preferindas teo infuzita en la pasinta tago. Pro malsameco de produktoj, specoj, plukaj tempoj kaj prilaboraj metodoj, teo havas malsamajn nutrajn elementojn. Estas preferinde somere trinki verdan teon (t.e. teo nefermentinta, ĉar oni antisepsas

ĝin per alta temperaturo, tial ĝi konservas la verdan koloron.), vin tre trinki brunan teon (t.e. plene fermentinta teo), printempe kaj aŭtune trinki jasmenan teon.

Estas tre utile ofte trinki teon varmetan kaj ne tro fortan, kaj trinki ĝin en konvenaj horoj. Tetrinkado post manĝo utilas al digestado. Tetrinkado en tagmezo estas vigliga. Ne trinku ĝin antaŭ manĝo nek antaŭ enlitiĝo, ĉar tetrinkado antaŭ manĝo estas malkvietiga kaj tiu antaŭ enlitiĝo malhelpas endormiĝon. Teo estas utila por sensoifigo, sed malutila por kunenglutado de medikamento. Ĉar teino entenata en teo povas eksciti la centran nervan sistemon kaj kortekson kaj estas vigliga por la cerbo, tial neniam trinku teon kune kun medikamento kontraŭ sendormeco kaj tuso. Neniam trinku teon samtempe kun ĉinaj medikamentoj ginsengo, codonopso (*Codonopsis pilosula*) kaj medikamentoj kontraŭ anemio por preventi medicinaĵan sedimentiĝon, eksciton de stomako kaj intestoj, lakson kaj ventrodoloron. Mi proponas, ke infanoj ofte trinku malfortan teon kaj gargaru sin per teakvo. Verda teo taŭgas por adoltoj. Ĉar junaj fraŭlinoj en menstruo kaj mezaĝulinoj en klimaktero ofte estas malkvietaj, tial mi proponas al ili jasmenan teon, kiu estas utila al reguligo de la hepata funkcio kaj cirkulado de la vitala energio. Bruna teo estas konvena al fizikaj laboruloj kaj malvarmumiĝintoj. *Tieguanyin*, teo duonfermentinta, produktita ĉefe en Fujian-provinco, estas utila al la malsanuloj suferantaj de aterosklerozo, koronara malsano aŭ cerba embolozo. Teo estas utila por rezisti kontraŭ radiado.

La homoj, kiuj estas ofte priraditaj dum laborhoroj aŭ longatempe rigardas televidon, devas trinki teon por levi sian kapablon kontraŭ radiado.

La ĉinoj havas multajn metodojn por batali kontraŭ malsanoj kaj sin sanigi per teo. Jen kelkaj el ili:

1. Kontraŭ malvarmumo kaj febro

Recepto: nuksokerno, ŝenoprazo kaj zingibro ĉiu po 25 g. kaj 15 g. da teo.

Metodo: Pistu la nuksokernon, ŝenoprazon kaj zingibron. Metu ilin kune kun la teo en argilan poton, aldonu 1.5 bovlojn da akvo kaj dekoktu ilin. Trinku la dekoktaĵon kaj kuŝu sub dika litkovrilo. Gardu vin de vento.

Tiu recepto estas utila al ŝvitado kaj mildigo de febro kaj efika por kuraci malvarmumon kaj kapdoloron sen ŝvito.

2. Kontraŭ lakso de bebo

Recepto: unu gramo da verda teo produktita en Yunnan

Metodo: Pulvorigu la teon. Dividu la pulvorigitan teon en 3 dozojn kaj enbuŝigu al la bebo la teon kune kun varmeta akvo aŭ lakto. Ĉiufoje po unu dozo. Ĉiu seanco daŭras 1-4 tagojn.

Tiu recepto estas utila al digesto kaj mildigo de febro kaj lakso.

3. Kontraŭ ulcero

Recepto: ajna kvanto da feĉo de infuzita teo

Metodo: Ŝmiru la feĉon en la ulceron.

Tiu recepto estas utila por mildigo de febro kaj sentoksigo kaj kuracas ulceron, mordon de hundo, brulvundon kaj furunkon. ■

# Stepo Xilin Gol



La 24-an de julio 1998 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarko-serion pri stepo Xilin Gol de Interna Mongolio, kies klimato apartenas al tipa mezvarma zono. La stepo estas ĉefa natura paŝtejo sur la stepo de Interna Mongolio, kiu estas unu el la 4 grandaj stepoj de Ĉinio. Oni nomas ĝin "verda trezoro sur la terglobo konservanta sian naturan aspekton. La 8-an de decembro 1997, la stepo fariĝis ŝtatnivela naturparko sankciita de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio.

La serio havas 3 pecojn. La 1-a prezentas tipan stepon, la 2-a — marĉan stepon kaj la 3-a — poplaron kaj betularon. Krome, estis emisiita ankaŭ poŝtmarka bloko pri zigzaga rivero Xilin Gol.



Huangshan-monto en nubaro

Foto de GU WEIHENG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第七期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11-1339/G2